

LA FORGESITO

# AMA STELARO

Tradukaĵoj kaj originalaĵoj




Eldonejo:

**Oskar Ziegler & Ko., Marktredwitz (Bayern)**

1922

Al mia lumo



ENHAVO

	paĝo
<a href="#">Dediĉo</a>	5
<a href="#">Al la leganto</a>	6
<a href="#">La korvo kaj la vulpo</a> (trad. el Coelho Netto)	7

<a href="#"><u>La nigra papilio</u></a> (trad. el Olavo Bilac)	43
<a href="#"><u>Triolet</u></a> (originale verkita)*	76
<a href="#"><u>Alvoko</u></a> (trad. el João Baena)*	77
<a href="#"><u>Sola</u></a> (originale verkita)*	80
<a href="#"><u>Kiel knabo povas sin mem rekomendi</u></a> (trad. el angla lingvo)*	81
<a href="#"><u>Rozoj, rozoj ...</u></a> (originale verkita)	83
<a href="#"><u>La horloĝo</u></a> (originale verkita)	85
<a href="#"><u>Lulkanto</u></a> (originale verkita)	86
<a href="#"><u>Se mi estus riĉa ...</u></a> (laŭmemore verkita)*	87
<a href="#"><u>Marmeze</u></a> (originale verkita)*	93
<a href="#"><u>Vero vera</u></a> (originale verkita)	94
<a href="#"><u>Neĝa statuo</u></a> (originale verkita)	96
<a href="#"><u>Inter nuboj</u></a> (originale verkita)*	97
<a href="#"><u>Confiteor</u></a> (trad. el Luiz Guimarães Filho)	104
<a href="#"><u>Miraklo</u></a> (originale verkita)*	105
<a href="#"><u>Ami estas mia penso</u></a> (originale verkita)	107
<a href="#"><u>Lina el Moskvo</u></a> (trad. el Dro Nuno de Andrade)*	109
<a href="#"><u>Destino</u></a> (trad. el nekonata aŭtoro)*	118

[\*]Jam aperinta en Esperanta gazeto.

## Al la leganto

Eble vi demandas al vi mem, kial la aŭtoro ne aperigas sian propran nomon, kaj kial li sin prezentas kiel *La Forgesito*. Unue, por la tutmonda esperantistaro, tio estus nur anstataŭo de pseŭdonimo, ĉar ambaŭ nomoj estas nekonataj. Due, mi ĉiam

rimarkas, ke la verkoj estas pli ŝatataj, se la nomo de la aŭtoro restas en mistera ombro.

Multe da fojoj mi aŭdis tiun ĉi dialogon:

—A. (varme)—Belege! Kiu estas la aŭtoro?

—B. (same)—L a F o r g e s i t o !

—A. —Tio estas pseŭdonimo.

—B. —Ha! La aŭtoro estas F.

—A. (malvarme)—Ne malbele.

Do, mi profitas je la sperto por esperi, ke ankaŭ vi tre varme diros—Belege!—, antaŭ ol vi konas la veran nomon de


La Forgesito

Decembro 1921.

COELHO NETTO

## **La korvo kaj la vulpo**

Porinfana komedio en unu akto



### **Personoj**

•

Alberto  
Edmundo } filoj de Terezo

- La profesoro
- Terezo
- Lucindo, servistino

# Unu-akto

(Ĉambro dece meblita. Flankaj pordoj)

## Sceno unua

Alberto kaj Edmundo

Alberto (eniras tra la dekstra pordo)

Tre certe mi ne sukcesas fari la aĉan priskribon. La profesoro al mi diris: antaŭe sentu bone, poste priskribu, kaj mi ne sentas ion alian ol mallaboremon; mallaboremon kaj malsaton. Kaj vi? Ĉu vi jam faris la enuigaĵon?

Edmundo (ridetante)

Mi pensas, ke mi faris.

Alberto

Ĉu bone farita?

Edmundo

La profesoro juĝos.

Alberto

Vidigu. Mi imagas al mi vian verkon. Vi havas tre riĉan vervon poetan. Mi neniam forgesos tiun admirindan soneton, kiun vi verkis por la naskiĝa datreveno de la profesoro, kiu ne ĝin komprenis. Li estas homo vulgara, tre vulgara. Ekster la reguloj gramatikaj kaj la komentarioj pri Camões<sup>[1]</sup>, li estas ŝtonego.

Edmundo (vante)

Ĉu vi memoras? Estis unu strofo bone farita...

Alberto

Unu strofo...! La tuto estis belega—dek kvar versoj valorantaj mil. Kaj la stilo...! Kaj la riĉegeco de l' rimoj...!

Edmundo

Li trovis du versojn eraraj kaj unu malglata.

Alberto

Malglata estas li! Versoj eraraj... Kie estas la versoj eraraj? Envio... Envio, ĉar la poezio estas donaco de l' dioj—oni ne lernas senti kiel oni lernas la sintakson. Li scias funde ĉiujn regulojn de la belparola arto, sed, kiam li skribas, ŝajnas, ke tion li faras per fera bastono, tiel rigida estas lia frazaro. Kion vi priskribis? Ni vidu la majstro-verkon.

Edmundo

Mi priskribis someran tagiĝon.

Alberto (flatemule)

Kun la kanto ĝojiga de l' birdetoj, la bleketo de la ŝafaro, la roso brilanta sur la folioj...

Edmundo

Ja vi farus beletan paĝon, se vi volus: talentplena vi estas kaj vi esprimas ĉion pli purece kaj elegante ol mi.

Alberto

Bagatelaĵo. Mi tre emas fantazii, de kiam mi ĝin povas fari kun la dorso malsupren, sur la lito. Ha! por la kapo ne ekzistas io pli komforta ol bona lanuga kapkuseno; la libroj estas tre ĝenantaj. (Alia tono.) Lasu, ke mi vidu la priskribaĵon.

Edmundo

Jen. Sed ne ridu...

Alberto

Ridi? Preferinde diru: ne ploru. Ho! kara Edmundo, kedu—mi ne envias riĉaĵojn, sed tion... (Tuŝas la frunton.) Se Dio proponus al mi la elekton inter grandega riĉaĵo kaj bela talento, kiel la via, mi ne ŝanceliĝus eĉ sekundon. (Ravite.) La talento! (Alia tono.) Sed ni vidu la mirindaĵon. La estonto estas via. Mi... kompatinda! Eĉ mi ne scias, kiamaniere min ŝirmi kontraŭ la mizero. Fine... (Alia tono.) La tagiĝo... Ĝuste

mi pensis pri la malo: la noktiĝo. Mi komencis la priskribon: ĝi montriĝis tiel malluma, tiel implikita, ke ĝi similis vintran nokton. La nokto estas mia vundebla flanko. Dormi... Kaj kie estas la Tagiĝo?

Edmundo

Jen, prenu.

Alberto

Donu. (Edmundo transdonas al li paperon.) Kia skribo! Mi ne scias, kiamaniere vi sukcesas skribi tiel simetrie, mia knabo. Kvieta karaktero... Mia skribo estas fuŝaĉo, kiun mi mem kelkfoje tre malfacile povas deĉifri. (Eklegas senvoĉe, kun gestoj de admiro. Edmundo rigardadas lin vante. De tempo al tempo Alberto ekkrias): Belete! Admirinde! Belege! (Subite.) Kia belaĵo, Edmundo! Mi fieriĝas pro vi. Mi tuj montros tion al Aŭgusto... Li estas tiel tromemfida. Estas bone, ke li vidu paĝon el majstro. Nur unu minuton.

Edmundo

Ne malfruiĝu. La profesoro baldaŭ venos.

Alberto

Nur momenteton. (Eliras tra la dekstra pordo.)

## Sceno dua

Edmundo kaj Terezo

Terezo (eniras tra la maldekstra pordo)

Kie estas via frato?

Edmundo

Li ĵus iris najbaren por montri aferon al Aŭgusto.

Terezo

Anstataŭ labori. La profesoro tuj venos, estas preskaŭ la deka. (Alia tono.) Nu, ĉu vi jam faris vian ekzercon?

Edmundo

Jes, patrino. (Karese.) Kaj se mi ricevos la plej bonan noton, ĉu panjo kondukas min al la urbocentro, por ke mi elektu ludilon?

Terezo

Ja, certe. Vi bone scias, ke mi plenumas ĉiam mian promeson.

Edmundo

Mi volas fervojon, kun la reloj, la pontoj, la tuneloj... por ludi en la ĝardeno.

Terezo (ridetante)

Kaj se Alberto sukcesos pli bone?

Edmundo

Alberto... (Ridetas ironie.) Al li la premio...

Terezo

Vi malŝatas vian fraton. Tamen atentu, la profesoro opinias lin tre inteligenta. Eĉ li diras, ke estas domaĝe, ke li ne lernas diligente.

Edmundo

Mi ne opinias male, panjo. Alberto estas pli vigla ol mi, lia inteligenteco estas pli granda, sed... li malamegas la librojn. Li dormas sur ili. Vi vidos, ke li ne prezentas eĉ unu linion pri la ekzerco.

Terezo

Ĉu li ne ĝin faris?

Edmundo

Dum mi estis skribanta, li dormis. Eble li laboris matene.

Terezo

Povas esti. Li ellitiĝis tre frue, kaj sin enŝlosis en la ĉambro.

Edmundo

Por trarigardi la gravuraĵojn de la ilustritaj revuoj.

Terezo

Ĉu vi vidis?

Edmundo

Li mem diris.

Terezo

Des pli malbone. Li ricevos, kion li meritos. (Atentante.) Mi supozas, ke li venas.

Edmundo

Eble tiu estas la profesoro, kaj mi tuj iras por alporti miajn librojn.

## Sceno tria

Terezo kaj Alberto

(Alberto eniras tra la dekstra pordo, suspekteme)

Terezo

De kie vi venas kun la vangoj tiel ruĝaj?

Alberto

Ĉu mi? De la laboro.

Terezo

Ĉu vi ne iris al la najbaro? Edmundo diris al mi, ke vi estis alirinta al Aŭgusto por montri ion al li.

Alberto



Mi iris revidi mian ekzercon. (Kolerete.) Mia moŝto frata kontrolas troege miajn paŝojn. Certe li parolis malbone pri mi: ke mi dormis, ke mi ne atentis pri mia tasko. Jes, mi dormis, nokte, ĉar mi preferas labori dum la freŝo de la mateno. Plie, mi ne havas la kreigan fantazion de Edmundo, nek mi verkas laŭ informoj: mi elrigardas kaj mi priskribas, kion mi vidis. Je kioma horo mi ellitiĝis hodiaŭ? Panjo vidis.

Terezo

Jes, estis frumatene.

Alberto

Je duono de la sesa. Por kion fari? Por vidi la sunleviĝon, aŭdi la birdojn, senti la tagiĝon.

Terezo

Kaj ĝin priskribi...?

Alberto (kaŝe-malice)

Mi ne scias. Baldaŭ vi vidos. Kiam la lernama Edmundo iris en la lernoĉambron, mi jam estis fininta mian laboron kaj mi amuzadis min rigardante la gravuraĵojn de la revuoj. Poste mi aliris al la ĝardeno kaj li restis tie ĉi.

Terezo

Kaj via skribaĵo?

Alberto

Mi lasis ĝin en la paperujo.

Terezo

Do, se vi faris, kion vi diras, vi ricevos la merititan premion.

Alberto

Mi penadas plej eble, sed la mallaboremula reputacio persekutas min.—Eĉ se miaj verkoj estas pli bonaj ol tiuj de Edmundo, ĉiam la laŭroj estas rikoltataj de li—kiam tio ne okazas pro la merito, ĝi estas pro la aĝo, ĉar li estas pli juna. Kaj oni ne volas, ke mi indignu.

Terezo

Sed kiu klaĉas pri vi?

Alberto

Ĉiuj. Eĉ oni diras, ke mi profitas je tio, kion li faras.

Terezo

Mi neniam tion diris.

Alberto

Vi ne diris, sed iu diris. La profesoro mem, ĉiam, kiam mi prezentas ekzercon bone faritan, li rigardas min nekonfide, grumblas, nur pro tio, ke, iam, li trovis malgrandan elĉerpaĵon el Alencar<sup>[2]</sup> en unu el miaj skribaĵoj.

Terezo

Malgranda elĉerpaĵo! Pacienciĝu, Alberto—tio estis tuta paĝo, ne havanta unu solan linion el vi.

Alberto

Kiu scias, ĉu panjo volas, ke mi kunlaboris kun la aŭtoro de "Guarany"? Mi kopiis...

Terezo

Sed vi ne lernas kopii.

Alberto

Nu! Kion mi faras en la desegnado? Mi kopias.

Terezo

Tio estas alia afero—en la desegnado estas necese alkiutimigi la vido-senton al la linio, lertigi la manon...

Alberto

En la skribado estas necese al kutimigi la aŭdosenton al la harmonio de la frazo. Estas per la kopio, ke oni sukcesas fari "Venus"on, kaj la "Divina Comedia".

Terezo

Bedaŭrinde, mia infano, vi estas tro frazema. Kiu vin aŭdos, povos diri, ke viaj konaĵoj estas tre vastaj... kaj ĉion vi scias laŭ tio, kion vi aŭdas.

Alberto

Kaj tio ne estas malmultaĵo, panjo. Ekzistas pianludistoj rimarkindaj, kiuj ne havas alian meriton. La verŝajnoj estas nepraj; pli valoras orumita malriĉo ol trezoro en la mano de avarulo.

Terezo

Via memor-kapablo estas admirindega.

Alberto

Mi montras, ke mi atente aŭdas la vortojn de paĉjo.

Terezo

Via devo estas ankaŭ aŭdi liajn konsilojn.

Alberto

Kaj mi aŭdas ilin, panjo.

Terezo

Ne ŝajnas.

Alberto

Ili estas, kiel la semoj en la tero—siatempo ili floriĝos.

Terezo

Bone. Frazoj ne mankas al vi.

Alberto

Feliçe!

## Sceno kvara

Alberto, Terezo kaj Lucindo

Lucindo (dekstre)

Jen estas la profesoro.

Terezo

Enlasu lin.

Alberto

Momenton. (Al Lucindo.) Ĉu li portas verdajn okulvitrojn?

Lucindo

Ne, sinjoro.

Alberto

La blankajn?

Lucindo

Jes, sinjoro.

Alberto

Jen ni havas Camões...

Terezo

Kial?

Alberto

Por kompreni la klasikulojn, li uzas teleskopajn lensojn. Li havas la vidadon tre mallonga, la kompatindulo!

Terezo

Kaj vi havas la langon tre longa.<sup>[3]</sup>

Alberto

Kio abundas, ne malutilas. Tro da bono ne turmentas. (Sopire.) Ha! patrino mia, se vi imagus al vi, kiom kostas al mi elporti la vivon dum la horoj gramatikaj!... Dio ne faris la gramatikon ... male: li konfuzigis la lingvojn, kaj tio, kion ni faras per tiom da reguloj neutilaj, estas vera sakrilegio, ĉar ni pretendas korekti la ellaboraĵon de la Kreinto. La neregulaj verboj...

Terezo

Ĉu vi ne volas esti kuracisto?

Alberto

Vere mi ne scias!

Lucindo

Ĉu mi povas enirigi la profesoron?

Terezo

Jes. (Lucindo eliras dekstren.)

Alberto

Kaj en la ĝardeno la cikadoj kantas... Kia senkoreco! (Sidiĝas.)

## Sceno kvina

Terezo, Alberto kaj la Profesoro

La Profesoro

(eniras kun pakaĵo de libroj, salutante per multe da salamalekoj. Li estas treege miopa kaj senatenta)

SinJORino... SinJORoj. (Rekoninte Alberton.) Ho! Ĝi estas la knabo! Kiel vi kreskis! Tiel ne atendite vi ŝajnis al mi lia moŝto komandora! (Viŝante sian vizaĝon.) Kia varmo! Je noktomezo la termometro montris 25° sub la ombro.

Alberto

Mirinde estus, se, je tia horo, ĝi montrus ion sub la suno.

La Profesoro

*Est modus in rebus...* Por ĉiu plezuro devas esti mezuro.

Terezo (mallaŭte al Alberto)

Ĉu vi jam komencas?

La Profesoro

Mi pasis hieraŭ je la deka nokte tie ĉi... Via Moŝto estis ĉe la fenestro.

Terezo

Hieraŭ! dum tia pluvo, profesoro...!?

La Profesoro

Ĉu hieraŭ ne estis merkredo?

Terezo

Jes.

La Profesoro

Estis lunlume.

Alberto

Hieraŭ pluvegis.

La Profesoro

Do, tio okazis la merkredon de la pasinta semajno... (Ordante la librojn sur la tablo.)  
Sinjoro Komandoro ĉiam sanega?

Terezo

Feliĉe.

La Profesoro

Mi legis en ia ĵurnalo, ke li estas elektita prezidanto de ia kompanio... mi ne memoras de kia.

Terezo

De asekuroj.

La Profesoro

Ŝajnas, ke jes... Kaj nun! Kun tia kompanio Via Moŝto ne vivos tiel sola... Kiam la kompanio estas bona ĝi signifas riĉaĵon.

Terezo

Tiu kompanio estas en bonega situacio.

La Profesoro

Mi ĉiam diras al la knaboj, ke ili evitu la malbonajn kompaniojn. Estas iu Aŭgusto, kiu loĝas tie ĉi najbare... Ho, Sinjorino! Li estis mia lernanto... Li estas ŝtonego! Li neniam forlasis la substantivon, kaj por formi la multenombbron... Kia batalo! Mi al li diradis: oni formas la multenombbron per la aldono de "s"... ekzemple... Nenio! Silento! Ŝtonego, mia Sinjorino! Estas vere, ke la patro ankaŭ estas nomata S-ro Ŝtonego.

Alberto

Ne, profesoro, li estas S-ro Pipro.

La Profesoro

Kiel, Pipro? Ha, jes... vi estas prava—li estas Pipro, Ŝtonego estas la alia, mia domluiganto. Li ankaŭ estas malmola, tre malmola. (Ŝanĝas la okulvitrojn verdajn je aliaj malklaraj.)

Alberto (al si mem)

Okulvitroj ŝanĝitaj. Mi forkuris de Camões, sed mi ne min forsavas de la verboj neregulaj.

La Profesoro

Bone. Ni laboru.

Alberto

Mi iras por preni miajn librojn. (Eliras dekstren.)

## Sceno sesa

Terezo kaj la Profesoro

Terezo

Nu, profesoro! Ĉu vi opinias la knabojn preparitaj por la ekzamenoj?

La Profesoro

Certe, Sinjorino. Pri la angla lingvo ŝajnas al mi, ke ili estas iomete malprofundaj, ili ankoraŭ konfuziĝas. Ili sin prezentas tro memfide, kaj kiam mi pensas, ke ili tradukas Macauley aŭ Walter Scott, ili tradukas Chateaubriand. La pli maljuna precipe...! Inteligenta, tre inteligenta, sed ruza kiel neni! Ĉar mi ne vidpovas bone, li trompas min, kaj mokas min. Mi demandas, ekzemple: Kiel oni diras ĉevalo en la angla lingvo? Kaj li tuje respondas: *Cheval!* Terpomo? Li: *Pomme de terre*. Kaj mi konsentas... Manko de vidpovo. Kiam tio okazas, la alia ĉiam atentigas min. Nun mi kunportas okulvitrojn pli fortajn kaj en granda kvanto. Mi havas ilin por ĉiuj lingvoj kaj sciencoj. (Elprenas el la poŝo aron da okulvitroj.) Por la matematiko... Bonvolu Via Moŝto vidi la dikon de tiuj lensoj.

Terezo

Vere, ili estas tre dikaj.

La Profesoro

Kaj tre delikataj, senmiksa kristalo. Ili kostis al mi tre multe. Kun tiuj ili ne trompos min.



Terezo

Kaj Edmundo?

La Profesoro

La pli juna?

Terezo

Jes.

La Profesoro

Perlo! Kaj tre inteligenta! La pli maljuna estas aglo, li flugos tre alten, Sinjorino... sed li volas nur ludi. Li estas el tiuj, kiuj maljuniĝas ludante la blindkaŝon.

Terezo

Tia estonteco ne plaĉas al mi.

La Profesoro

Sed li estas gaja.

Terezo

Kaj pri la portugala lingvo? Ĉu ili progresas kontentige?

La Profesoro

Pri la portugala lingvo mi ne estas tre postulema, ĝi estas hejma lingvo, oni ne atentigas pri ĝi. Por la fremdaj mi aplikas mian tutan atenton. Hejme oni sin kondukas senceremonie: vestaĵeto el kotono, eĉ kun unu aŭ alia flikaĵo. Por iri en la societon oni postulas la plej bonajn vestojn, ĉu ne vere? Unu solecismo, de tempo al tempo, en la portugala lingvo, eĉ estas spritaĵo... Kaj kie staras tiu, kiu ĝin ne diras, sinjorino?

Terezo

Sed mi ne konsentas kun vi, profesoro. Mi opinias ke ili devas scii fundamente sian gepatran lingvon, eĉ kun malprofito por la aliaj. Unue mi, poste vi.

La Profesoro

Jes, unue Via Moŝto.

Terezo

Ne, la portugala lingvo.

La Profesoro

Tiel vi opinias?

Terezo

Kaj tiuj, kiuj saĝe pensas.

La Profesoro

Nu! En mia spirito mi formis la ideon, ke Via Moŝto, kiel la plejmulto el la gepatroj preferas, ke la knaboj diru unue: *Bon jour!*

Terezo

Ne, mi postulas, ke li diru unue—"Bom dia."<sup>[4]</sup> kiel diradis liaj prapatroj, poste...

La Profesoro

Prave oni diras, ke ne ekzistas regulo sen escepto. Nu, en la portugala lingvo ili ne estas ankoraŭ tre progresintaj, tio estas vero... sed en la franca!... Ili scias parkere elĉerpaĵojn el Racine, Corneille, Lamartine, Hugo...

Terezo

Kaj el Camões?

La Profesoro

Camões?... Camões estas domano. Nur de ne longe, ili lernas "La luzidojn". Sed ni povas atendi.

Sceno sepa

Terezo, La Profesoro, Edmundo, poste Lucindo

Edmundo

(eniras tra la maldekstra pordo kunportante librojn)

Bonan tagon, profesoro.

La Profesoro

Bonan tagon. Ĉu tiu estas la alia? (Atentigante la rigardon.) Ho, ĝi estas la pli juna. La alia estis tie ĉi antaŭ ne longe.

Terezo

Li iris por preni la librojn.

La Profesoro

Mi ne dubas, ke li restas tie. (Terezo sonoras.) Certe estas necese lin vokigi. (Lucindo aperas dekstre.)

Terezo

Diru al Alberto, ke jam estas la horo de la leciono.

Lucindo

Jes, sinjorino. (Malaperas.)

La Profesoro (sidiĝante ĉe la tablo)

Nia leciono hodiaŭ estas...?

Edmundo

Verboj de la unua konjugacio.

La Profesoro

Verboj de la unua konjugacio... Ĉu vi memoras, kion mi diris al vi pri la verboj de la unua konjugacio?

Edmundo

Ke ĉiuj estas tre freŝaj...

La Profesoro

Tre bone. Kial?

Edmundo

Ĉar ili finiĝas per "ar"<sup>[5]</sup>

Terezo

Eĉ "queimar"<sup>[6]</sup>, ekzemple, profesoro?

La Profesoro

Jes, sinjorino, ĝi estas el la unua konjugacio.

Terezo

Mi bone scias; sed ĉu ĝi estas freŝa?

La Profesoro

Ĝi havas "ar" en la fino.

Terezo

Jes, kiam oni surblovas la brulvundon.

La Profesoro

Tiu procedo mnemonika estas ekskluzive mia.

Terezo

Kaj ĉu vi havas alian por la ceteraj konjugacioj?

La Profesoro

Mi pripensas pri tio, sinjorino.

## Sceno oka

La Profesoro, Terezo, Edmundo kaj Alberto

Alberto

(eniras kun brovoj kuntiritaj kaj sidiĝas krucigante la krurojn)

Mi ĉeestas!

La Profesoro

Bonan tagon... (Fiksante lin per la rigardo kaj al si mem.) Tiu ĉi estas la alia... (Laŭte.) Mi pensas, ke por hodiaŭ ni havas ekzercon de verkado, ĉu ne vere? (Esplorante kajeron.) Jen estas en mia notlibro. (Legante.) "Por la filoj de komandoro Barboza, ekzercoj de verkado kaj kilogramo da kafo"... (La knaboj ridas. Korektante.) Ne, la kafo estas por mi. (Fermante la kajeron.) Kia temo?

Edmundo

Laŭvola.

La Profesoro

Laŭvola... Tre bone. Kaj... ĉu vi ambaŭ ĝin faris?

Alberto kaj Edmundo (samtempe)

Jes, sinjoro.

La Profesoro

Tre bone.

Terezo (al Alberto, mallaŭte)

Sidu dece.

La Profesoro

Sinjoro Alberto. (Alberto stariĝas.) Legu vian ekzercon.

Alberto

Nature?

La Profesoro

Kompreneble.

Alberto

Iafoje vi postulas, ke ni legu emfaze.

La Profesoro

Jes, vi estas prava. Sed hodiaŭ mi volas, ke vi legu nature.

Alberto (legante dolĉe)

"Tagiĝo."

Edmundo (surprizita)

"Tagiĝo!"

Alberto

Pro kio la miro? La profesoro diris, ke mi evitu la malklarecon: pli klara ol la tagiĝo... nur la tagmezo.

Edmundo

Sed ankaŭ mi...

La Profesoro

*Sol lucet omnibus.* La suno lumas por ĉiuj.

Alberto (superece)

Kiu scias, ĉu Dio faris la tagiĝon, nur por ke mia klera frato ĝuu kaj priskribu ĝin?

Terezo

Ne koleriĝu.

Alberto

Mi ellitiĝis je la kvina: panjo povas atesti, kion mi diras; mi iris en la ĝardenon por surprizi la unuan lumradion. Kion mi vidis, tio estas tie ĉi, bona aŭ malbona. (Dum la legado, Edmundo ne povas sin moderigi, esprimante per gestoj nereteneblaj sian indignon. La profesoro signofaras, ke li kvietiĝu; Terezo devigas lin sidiĝi, lin kvietigas. Alberto ne maltrankviliĝas kaj proporcie, laŭ li legas, grandiĝas lia entuziasmo): "Malforta koloro heligas serenon la ĉielon. La rando de l' horizonto ruĝetas, koloriĝas per purpuro—oras trio strekas ĝin, brilegante. La nestoj vekiĝas, kaj la birdaro forflugas ĝoje, pepante tra la libera spaco. La arboj rebrilas, malseketaj de roso; gutoj brilantaj ekstrema sur la delikataj folioj, kaj la akvoj rapidetaj kantas murmure..."

Edmundo (ne povante sin reteni)

Sed tio estas el mi!

La Profesoro

Silentu!

Edmundo

Li forŝtelis.

Terezo

Tion oni ne diras!

La Profesoro

La verbo "forŝteli", de la vidpunkto de la ĝentileco, estas neregula, neregulega. Ĝi ne estas dirinda, ĝi ne estas konjugaciinda, ĝi ne estas uzinda.

Edmundo

Eĉ kiam ĝi estas la esprimo de la vero?

La Profesoro (kategorie)

*Nunc et semper!* Nun kaj ĉiam!

Alberto (tre kviete)

Ĉu mi povas daŭrigi?

Terezo

Jes, vi povas.

Alberto (daŭrigante)

"...kantas murmure..."

La Profesoro

Kiel bonege!

Alberto

"...kantas murmure kaj agrable. La brutaro blekas sur la kampoj; sonorilo aŭdiĝas de malproksime; la kulturisto aperas ĉe la pordo de sia kabano, kaj, feliĉa, rigardante la leviĝantan sunon, suprenlevas la manojn, kvazaŭ por danki al la Kreinto la bonfaron de la lumo." Mi finis (sidiĝas).

La Profesoro

Lukse bele! Lukse bele! Nun sinjoro Edmundo. Mi jam scias, ke vi elektis la saman temon, sed ne estas temoj, ne jam pritraktitaj de la poetoj... *Nihil novi sub sole*. Nenio nova sub la suno... kaj ĉiam aperas novaĵoj. La verko de via frato estas bonega, sed la via povas esti pli bona. Ni vidu.

Edmundo

Sed ĝi estas la sama... Mi certigas, ke Alberto kopiis... Mi ne legos. (Lasas la verkaĵon sur la tablo. Terezo, nerimarkite, forprenas ĝin, kaj malferminte libron, kaŝas la paperon inter la folioj.)

Alberto

Ĉu mi kopiis?!

Edmundo

Ja, vi kopiis!

Terezo



Sed kiel tio okazis?

Edmundo

Tie ĉi mem. Mi estis fininta mian taskon, kiam Alberto eniris, demandante, ĉu mi jam faris la ekzercon. Mi respondis jese, kaj li, kiu estas ruza, eklaŭdis min: "ke mi certe skribis belan paĝon, ke mi estas talentplena, ke mi versofaras admirinde..." kaj...

La Profesoro

...kaj vi lasis la fromaĝon fali.

Edmundo

La fromaĝon?! Kian fromaĝon?

La Profesoro

Jes, kiel ĉe la fablo de l' korvo kaj la vulpo.

Edmundo

Post multe da babilado, da bedaŭro, li petis, ke mi donu al li la verkon por ĝin montri al Aŭgusto. Mi, naive, transdonis al li...

Alberto

Vi mensogas!

Terezo (admone)

Alberto!

La Profesoro

Do, ekzistas malhonestajo.

Edmundo

Jes, sinjoro, kaj la viktimo estas mi.

Alberto (atakante)

Ekpruvu! Li diras, ke mi iris por montri la verkon al Aŭgusto. Do, vokigu Aŭguston, kaj li diru, ĉu li jam vidis min hodiaŭ.

Edmundo

Tion mi kredas. Vi ne kunestis kun li, vi estis kopianta tion, kion mi faris.

Alberto

Mi skribis mian verkon matene; mi lasis ĝin en la paperujo, kaj poste mi iris en la ĝardenon. Sinjoro mia frato ne forlasis la ĉambron... Kion li tie faris, mi ne scias.

Edmundo

Eble vi volas diri, ke mi estis kopianta vian inspiraĵon?

Alberto

Mi ne diris tion.

La Profesoro

Fine, unu el vi alpropiigis al si fremdan verkon. La kulpulo sin prezentu, kaj mi promesas mian pardonon.

Terezo

Momenton, profesoro. Relegu vian verkon, Alberto.

Alberto

Tre volonte. (Malvolvas la paperon kaj legas kviete.) "Malforta koloro..."

Terezo

(ŝajnigante legi en la libro, samtone)

..."heligas serenon la ĉielon." (Movo de Alberto. La du knaboj sin interrigardas, mirigite. La profesoro ŝanĝas la okulvitrojn maltrankvile.)

Alberto

"La rando de l' horizonto ruĝetas,"

Terezo

..."koloriĝas per purpuro,..."

La Profesoro

Eksterordinare!

Alberto (per voĉo tremanta)

—"ora strio..."

Terezo

..."strekas ĝin, brilegante." (Ridetante.) Daŭrigu...

Alberto (jam konfuzite)

"La nestoj vekigigas..."

Terezo

..."kaj la birdaro forflugas ĝoje, pepante tra la libera spaco." Daŭrigu!

Alberto (per voĉo preskaŭ neaŭdebla)

"La arboj rebrilas..."

Terezo

"Malseketaj de roso,..."

La Profesoro

Kian mirindegan memorkapablon vi havas!

Terezo

Antaŭen!

Alberto (kolerete)

Mi ne legos plu.

Terezo

Tute ne estas necese. Ambaŭ vi meritas severan punon, ĉar ambaŭ vi estas kulpuloj de la sama krimo. La elĉerpaĵo estis malnoble kopiita el Alexandre Herkulano.<sup>[7]</sup>

La Profesoro

Kiel! Mistifikaĵo!... (Ŝanĝas la okulvitrojn.) Ho!

Edmundo (mirigite)

Kopiita! el Alexandre Herkulano! Panjo vi eraras.

Terezo (montrante la libron)

Vidu tie ĉi (momento de silento).

Alberto

Mi jam sciis. (Al Edmundo.) Ĉu mi ne diris al vi, ke mi senmaskigos vin?

Edmundo

El Alexandre Herkulano... Sed tio estas neeblo!

La Profesoro

Kial neeblo, se ĝi estas en la libro?

Edmundo

Mi certigas...

Alberto

Mi tion faris intence. Vi pensis, ke vi trompas min. Mi estos ĉio, kion vi volos, escepte malsaĝulo. (Arogante.) Ĝi estas kopiita el Alexandre Herkulano... Mi vidis, kiam li estis kopianta; mi notis la numeron de la paĝo kaj mi decidis konfuzigi lin ... per ŝercaĵo.

Terezo

Ĉu vi?

Alberto

Jes, patrino, mi mem. En ĉi tiu domo estas nur unu persono, kiu laboras: tiu estas sinjoro Edmundo. Ĝi estas perfektaĉo, tia verko. Mi same kapablas verki poemojn.

Edmundo (priokupita)

El Alexandre Herculano...! Dio mia! sed kiel tio okazis?! mi neniam vidis verkon el Alexandre Herculano... Ho! jes! mi legis "Eŭriko", sed jam antaŭ tre longe. (Afliktita.) Mi freneziĝas.

Alberto (sarkasme)

Ho, frato mia! Tiu ne estas la unua korbo, kiun vi faras.<sup>[8]</sup>

Terezo (stariĝante, severe)

Sufiĉe! (Al Edmundo.) Do, vi ne kopiis?

Edmundo

Mi ĵuras, panjo...

Terezo

Ne ĵuru. Sufiĉas, ke vi diru: jes aŭ ne.

Edmundo (fiere)

Ne!

Alberto

Kaj li neas!...

Terezo (al Alberto)

Kaj vi?

Alberto (senĝene)

Mi kopiis...

Terezo

El Alexandre Herculano.

Alberto

Kompreneble.

Terezo

Profesoro, la verko, bona aŭ malbona, estas originala el Edmundo (Movo de la knaboj—ĝoja, de Edmundo; indigna, de Alberto.) Mi uzis artifikon, kaj la rezultato preterpasis ĉion, kion mi esperis. Jen estas la originalo de Edmundo, kiu min servis por la lego; la verko de Alexandre Herculano, kiu estas en mia mano, estas ... la nunjara almanako. (Al Alberto.) Kaj nun? Ĉu vi havas ion por diri kontraŭ via frato?

La Profesoro (al si mem)

Tiu virino havas sangon de Salomono en siaj vejnoj.

Alberto (konfuzite)

Mi ŝercis...

Terezo

Vi ŝercis? Ne! vi havigis al vi ludilon miksitan el mallaboremo, el malnobla flato, el mensogo, kaj plie el kalumnio. Nur unu el tiaj elementoj sufiĉas por makuli unu vivon. Vi uzis ilin samtempe, kaj via ago devas resti kiel ekzempla malvirto. Memoru ĝin, kaj korektiĝu. Kaj pro kio vi vidas vin humiligita? Ĉu pro tio, ke vi estas malsprita? Ne. Pro tio, ke vi estas malsanulo? Ne. Pro tio, ke vi ne disponas je tempo por labori? Ne.—Simple pro tio, ke vi estas mallaborema.

Alberto (sin ĵetante en ŝiajn brakojn)

Panjo ... mi promesas...

Edmundo (kortuŝita)

Lasu lin, panjo. Li ne faris malbonintence. Alberto estas bonkora.

Alberto

Kaj honorama, mia frato; vi vidos! (Eliras plorante. Terezo lin sekvas.)

La Profesoro

(ŝanĝante la okulvitrojn, post silento)

Vi, mia amiketo, antaŭgardu vin: aŭdu la belajn vortojn, sed evitu, ke la fromaĝo defalu el via beko. Vulpoj ekzistas ĉie kaj centope, kaj ili scias kanti, eĉ plezurige.

(Kurteno.)

OLAVO BILAC

## **La nigra papilio**

Komedio en unu akto

El portugala lingvo  
tradukis

**La Forgesito**



### **Personoj**

- Matildo
- Mario, servistino
- Eleonoro, filino de Matildo

### **Unu-akto**

Ĉambro eleganta: Pordoj flankaj

### **Sceno unua**

Eleonoro kaj Mario

Mario (tenante plum-balailon)

Tre granda?

Eleonoro

Grandega!... Kaj tute nigra. Ĝi ŝajnis velura. Mi estis, ĉe la fenestro, ĝuanta la lunlumon, kiam ĝi eniris, kaj sin metis sur la kartonan kadraĵon de la orkideoj.

Mario (priokupita)

Kaj tio okazis nokte...

Eleonoro

Jes, nokte.

Mario

Des pli malbone. Tiuj aferoj, nokte, estas plej danĝeraj. Nigra papilio...

Eleonoro

Eble tiu estas averta, Mario.

Mario

Jes... Eble...

Eleonoro

Mi tre timas morti... (Ploras.)

Mario

Ne ploru, fraŭlino. Mi tuj faros ion; vi vidos, ke nenio malbona okazos.

Eleonoro

Ha, Mario! (Kun intereso.) Kio?

Mario



Lasu... Mi prenas sur min la aferon.

Eleonoro

Kaj ĉu vi jam vidis ion similan?

Mario

Ja, certe...! Kiom da ili! Nia bona Dipatrino!... Oni ne povas plu kalkuli. (Mistere.) Aŭskultu! Iam, hejme, ni estis laborantaj nokte en la manĝoĉambro, kiam ĉe la duono de la naŭa, eniris nigra papilio, tute egala al tiu, kiu aperis al vi, kaj enflugis, haltante jen sur la plafono, jen sur la mebloj, kun la grandaj flugiloj larĝe etenditaj. Mia mortinta patrino, kiun Dio gardu, tuj malbenis ĝin, per preĝo tre forta, tiel forta, fraŭlino, ke, iafoje, ŝi ne alvenis ankoraŭ al la mezo, kaj la miraklo jam estis farita. Okazis konfuziĝo, neniuj plu pensis pri kudrado, kaj ni ekforpelis la antaŭsignon.

Eleonoro

Kaj kio okazis?

Mario

Nenio, pro la preĝo de panjo. Alifoje boteleto da salo elverŝiĝis sur la tablon. Ha, fraŭlino!... La sango malaperis el miaj vejnoj, kaj mi tuj faris ĵuran promeson al Sankta Antono. Tamen, malgraŭ tio, post unu jaro mia frato rulfalis sur la ŝtuparo kaj rompis al si la brakon. Se mi ne estus farinta la promeson, mi ne scias, kio okazus al la knabo. Ne! Kun tiaj aferoj mi ne volas ludon. Dio liberigu min! (Faras kruco-signon.) Mi kunportas ĉiam miajn amuletojn: unu pugn-amuleto el gagato, du el Gvineo, tri el korno, unu el koralo; mi havas ĉe la litkapo unu de tiu ĉi granda. Kaj tiu ĉi... (vidigas pugn-amuleton ĉe ŝia zono), kaj ankaŭ dento de maj-skarabo. La fraŭlino devas havi ŝian amuleton, almenaŭ unu. Ne ludu kun tia afero.

Eleonoro

Mi mortiĝas, Mario...!

Mario

Ne, vi ne mortiĝos. Fidu al mi. (Memfidege.) Nu! Ĉu mi estas aŭ ne via amikino? Mi, tiel frue kiel mi finos mian laboron, mi eliras al mia ĉambro, kaj mi preĝos.

Eleonoro

Do, iru tuj. Mi faros la balaon anstataŭ vi.

Mario

Vi?

Eleonoro

Jes. Kial ne?

Mario

Eble mia mastrino koleriĝos.

Eleonoro

Ne. Mi diros, ke mi mem tion volis, por fari iom da ekzerco. (Alia tono.) Kaj ĉu vi scias, kie estas troveblaj la pugn-amuletoj?

Mario

Jes.

Eleonoro

Kiaj estas la plej bonaj?

Mario

Tio dependas de la celo: por ensorĉigo, tiuj el Gvineo, aŭ el gagato. Por bonŝanco, tiuj el koralo. Por ... mi scias. Vi devas porti unu el gagato.

Eleonoro

Ĉu vi kapablas aĉeti unu por mi?

Mario

Jes.

Eleonoro

Kiel vi estas bonkora.

Mario

Ha! Kiam mi estas amika, mi estas vere amika.

Eleonoro

Donu al mi la plumbalailon, kaj iru tuj preĝi.

Mario

Do, ĝis baldaŭ. Kaj ne timu; de kiam mi preĝas, la malbono estas venkita. Ĉu vi ne memoras tiun serviston, kiu servadis tie ĉi? Felicianon? Mi tiele malamamis lin!... Mi tiom preĝis, ke la mastro forsendis lin.

Eleonoro

Ĉar li ŝteladis liajn cigarojn.

Mario

Babilaĵoj, fraŭlino! La ŝtelinto, tiu estis mi.

Eleonoro

Vi?!

Mario

Jes, fraŭlino.

Eleonoro

Kaj ĉu vi fumas?

Mario

Pro kolerego. Tiam mi fumis.

Eleonoro

Kaj vi ne sentis kapturon?

Mario

Ne, mi ne fumadis la cigarojn. Mi volis nur diri, ke interne mi furioziĝis. Mi ĵetadis ilin sur la straton, certa, ke la mastro suspektos Felicianon, kaj tio okazis. Mi diras tion al vi, por ke vi vidu, ke, kiam mi preĝas, mi sukcesas.

Eleonoro

Sed ŝajnas al mi, ke ne la preĝoj faris tion, Mario... ĉar...

Mario

La cigaroj... Nu! Se mi ne estus preĝinta, la mastro ne rimarkus la ŝtelon. Vi vidos.

Eleonoro

Do, iru. Mi ne kvietiĝas, antaŭ ol vi preĝos.

Mario

Nu, mi iras!

Eleonoro

Iru... Kaj atentu... Vi povas preni por vi la manteleton el punto.

Mario

Kaj por vi?

Eleonoro

Mi havas alian.

Mario

Dio pagu vin. (Eliras dekstren.)

## Sceno dua

Eleonoro kaj Matildo

(Eleonoro senpolvigas la meblojn, senatente, penseme.)

Matildo

(enirante tra la maldekstra pordo)

Ho! Kio okazas? Ĉu kaptis vin la febro de la purigo?

Eleonoro

Mi distras min.

Matildo

Bela distraĵo, nedubo. (Rimarkante, ke ŝi ploras.) Kio okazas al vi?

Eleonoro

Multe mi timas morti, panjo!

Matildo

Morti... Sed... ĉu vi sentas ion?

Eleonoro

Nigra papilio eniris en mian ĉambron, kaj haltis sur la kadro de la orkideoj.

Matildo

Kion signifas tio?

Eleonoro

Ĝi estas averto.

Matildo

Averto pri kio? Nu, filinjo... Kiu enmetis tiajn ideojn en vian kapon? Se vi ne volas, ke la noktaj papilioj eniru en vian ĉambron, fermu la fenestrojn. Mi, ĉiunokte, ilin havas, trioŭpe, kvarope, flugetantaj ĉirkaŭ mia litkurteno, kaj mi ne troe atentigas pri tio. Nia domo estas inter arboj, kie vivas la bestetoj de Dio, kiuj sin sentas altiritaj al la lumo. Kie estas la malbono, kiam ili vizitas min?

Eleonoro

Kaj la noktuo? Mi aŭdis ĝin ĉiunokte.

Matildo

Ankaŭ mi.

Eleonoro

Kaj panjo ne timas?

Matildo

Timi... Kion?

Eleonoro

La morton.

Matildo

Vi freneziĝis. La noktuo kantas, kiel kantas la pirolaj kaj la kanarioj. La kanto estas laŭ instinkto de l' birdoj. Ĉiu el ili montras per speciala maniero sian feliĉon pri vivo—tiu ĉi pepante, kiel la paseroj; tiu ĝemante, kiel la turto. La noktuo havas bleketon malĝojan, sed ĝi ne antaŭdiras malbonaĵojn—ĝi ne estas antaŭdiristino; ĝi estas nedanĝera besto, kiu vivas plenumante sian destinon. Kio, precipe, igas ĝian kanton malĝoja, tio estas la nokto kun la mistero, kiun nia fantazio disportas tra ĝi. La grekoj faris el la noktuo la penseman kunulon de Minervo, simbolo de la meditado, flanke de la saĝeco; kaj ni humiligas ĝin kiel antaŭdirantinon de la Morto. Superstiĉoj, mia filino.

Eleonoro

Superstiĉoj!...

Matildo

Jes. En la cerbo de la nesciulo estas nature, ke ili ekzistas; la kavaĵoj plenaj de mallumo estas la loĝejo de la legendo—tie vivas la drakoj, la ensorĉitaj bestoj, mirindigaj genioj. Por ke ĉio malaperu, sufiĉas la brilo de l' suno. Ili estas la rezultato de la ombro, perfekta figuro de la nescio. En cerbo kiel la via, tiaj kredoj ne devas persisti. Ĉu vi jam vidis, hazarde, ian feinon, ian monstran flugbeston?

Eleonoro

Ne.

Matildo

Tamen la fabeloj estas plenaj de ili, kaj ekzistas homoj certigantaj, ke ili jam ilin vidis. Petro, tiu servinto de via patreto, diradis, ke li renkontis akvo-feinon,<sup>[9]</sup> ĉe l' bordo de la rivero, kombantan al si la harojn per arĝenta kombilo. Kuraĝega ĝis la tro-riskemo, pro pago ia, li kapablos preterpasi, nokte, la lokon, en kiu li vidis la nomitan feinon. Li estis malklerulo, spirito naiva, plena de superstiĉoj. Sed vi...? Kiajn pruvojn vi havas?

Eleonoro

Mi? Sennombrajn!

Matildo

Diru unu.

Eleonoro

Tiel subite mi ne memoras. Interparolu kun Mario.

Matildo

Ha! Mario... Mi jam suspektis. Ĝi estas ŝi, kiu enmetadas en vian kapeton naivajn kredaĵojn. La superstiĉo, mia filino, estas malutilega fantazio—anstataŭ fariĝi floro, ĝi pintiĝas en dornoj, kaj sin returnas al la propra animo, kiu ĝin naskis: ĝi estas la restaĵo veneniga de la poezio. Forgesu tion. Al ĉio vi atribuas povon pereigan, kaj vi traserĉas antaŭsignojn en la plej sensignifaj fenomenoj—guto da oleo kiu elverŝiĝas, iom da salo elŝutita, plorbojo de hundo, kraketo de meblo. Ĉu vi opinias, ke la fortoj de la naturo havas nenion por fari, kaj sin amuzas susurante antaŭdirojn, montrante signojn de malfeliĉo? Sensenco!

Eleonoro

Panjo kontentiĝas dirante—sensenco! Sed vi ne konvinkas min pri la malo.

Matildo

Mario! Mi ne scias, kie ŝi lernis tiom da aferoj: ŝi interpretas sonĝojn, klarigas la influon bonfarantan aŭ malutilegan de la insektoj, demonstras, per absurdo, la ekziston de la demonoj, ŝi scias, kie estas sorĉistinoj, ŝi konas la herbojn sorĉantajn. Ŝi

estas kreitaĵo admirinda, supernatura, kapabla por ĉio, escepte por balai la domon kaj senpolvigi la meblojn, se oni ne insistas pri tio.

Eleonoro

Ĉio, kion ŝi diras, estas vera—pli unu tagon, malpli unu tagon, ĉio okazas.

Matildo

Kaj kion ŝi diris pri la nigra papilio?

Eleonoro

Tion, kion ĉiuj scias.

Matildo

Ĉiuj? Ne: mi ne scias.

Eleonoro

Ke ĝi antaŭdiras malfeliĉon.

Matildo

Ha! Tiun ĉi fojon la profetaĵo efektiviĝos. Voku ŝin. Mi volas aŭdi, kion ŝi diras. Al mi tre interesas la scio pri la tuta prognozo mistera. (Eleonoro eliras dekstren. Matildo sidiĝas ĉe la tablo kaj ekskribas. Poste silento.)

## Sceno tria

Matildo kaj Mario

Mario

(enirinte tra la dekstra pordo)

Ĉu la mastrino vokigis min?

Matildo (severe)

Jes. Unue por diri, ke vi legas troege.



Mario (surprizite)

Legi! Ĉu legi troege? Sed mi neniam vidis alfabetumon, mastrino. Mi neniam eniris en lernejon.

Matildo

Neniam vi tuŝis alfabetumon?

Mario

Mi? Ne, sinjorino.

Matildo

Ha! Vi ne legas tion, kio estas proksime al viaj okuloj, kion ĉiuj vidas; vi ne komprenas kiel grupo da literoj formas vorton, kaj vi volas legi la nevideblan, trapenetri la sekretojn de Dio, atingi la profundon de la Destino?

Mario

Mi ne komprenas, kion vi diras.

Matildo

Ĉu vi ne komprenas?

Mario

Ne, sinjorino.

Matildo

Kion signifas nigra papilio?

Mario

Nigra papilio? Malfeliĉo.

Matildo

Kaj akrido?

Mario

Akrido? Se ĝi estas verda—espero, sano, mono; se ĝi estas malhela—ĉagreno.  
Kolibro verda—ĝojiga letero; bruna—malbonaj novaĵoj. Grilo en la domo—malsano;  
en la flora ĝardeno—baldaŭa alveno de parenco. Hirundo ĉirkaŭflugante la domon...

Matildo

Sufiĉe...

Mario (protekteme)

Mi scias, kial mia mastrino demandas tion...

Matildo

Ĉu vi scias?

Mario

Jes, mi scias, sinjorino; ĝi estas pro la nigra papilio. Sed ne maltrankviliĝu,  
sinjorino—mi jam komencis la preĝon.

Matildo

Ĉu vi jam komencis la preĝon?

Mario

Jes, sinjorino.

Matildo

Kaj la papilio?

Mario

Ĝi foriris.

Matildo

Kaj vi tuj iros akompani ĝin?

Mario

Ĉu mi?! Kiel?

Matildo

Prenante vian pakajon kaj elirante tra la strata pordo.

Mario

Ĉu mia mastrino maldungas min? Kion mi faris?

Matildo

Ĉu vi ne scias?

Mario

Ne, sinjorino.

Matildo

Nu, mi tuj diros al vi. (Kviete.) Atentu: Se anstataŭ balai la ĉambron, alportante la balaaĵon al la deponejo, vi amasigus ĝin sub la mebloj, kio okazus post malmulte da tempo? Eĉ se plej multe zorge ni kaŝus ĝin, ĝi elŝutiĝus kaj, ĉe la plej malforta venteto, la polvo kaj la aliaj restaĵoj disŝutiĝus en la tuta domo.

Mario

Sed neniam mi faris tion.

Matildo

Vi faris pli grandan malbonaĵon.

Mario

Ĉu mi? mia mastrino povas esplori kaj, se vi trovos ion sub la mebloj, vi rajtas senkapigi min.

Matildo

Mi ne diras, ke estas io sub la mebloj, sed la spirito de mia filino superpleniĝas...

Mario

Kaj mi...? En la spirito, ... Sed mi neniam vidis la spiriton de Fraŭlino... Kion mi tien enmetis?

Matildo

Nigrajn papiliojn, akridojn, pinĉprenon da salo, spegul-pecetojn, feliĉigajn foliojn, pugn-amuletojn, konketojn, maj-skarabojn, herbojn sekajn... Mi ne scias kion plu! Kiu ĵetis tiujn frivolaĵojn en la animon de Eleonoro? Vi.

Mario

Mi?

Matildo

Jes, vi! Eleonoro estis gaja knabino, ĉiam ridema, elprenante el la vivo la helan parton—. Vi enpuŝis ŝin en la ombron kaj vi surĵetis sur ŝin ĉiajn balaaĵojn, kiujn vi kunportadis.

Mario

Kia balaaĵo, mastrino?

Matildo

Viaj superstiĉoj, viaj kredaĵoj ridindaj. Mi volas purigi, aerumi la spiriton de mia filino, kaj ne estos al mi facile sukcesi, se vi restos pli longe apud ŝi.

Mario

Mi ne komprenas, kion mastrino diras. Oni faris sorĉaĵon.

Matildo

Vi mem faris... Mi forsendas vin, ĉar mi ne volas sorĉistinojn en mia hejmo.

Mario

Sorĉistino! mi...!? (Plorema.) Tiel okazas ĉiam: kiu plej faras, malplej meritas; ju pli da laboro, des malpli da honoro. Mi nur volas la feliĉon de la fraŭlino, kaj mia mastrino nomas min sorĉistino. Dio estu laŭdata! La malsaĝa estas mi...

Matildo

Mi ne kontraŭdiras.

Mario

Jes. La malsaĝa estas mi—ĉar mi ne korektiĝas. S-ro Dro Mamede maldungis min pro araneo; nun mastrino forsendas min...

Matildo

Pro nigra papilio. La insektoj persekutas vin.

Mario

Nu, mastrino volus, ke mi lasu okazi la malfeliĉon?

Matildo

Kian malfeliĉon, Mario?

Mario

Tiu, kiu estis supre, en la aero...

Matildo

Ĉu estis malfeliĉo en la aero? En balono eble!

Mario

Mi ne scias.

Matildo

En la aero estas via kapo...

Mario

Mi povus paroli... sed mastrino opinias, ke mi estas sorĉistino.

Matildo

Ĉu vi povus paroli? Parolu, do.

Mario (plorante)

Ne, sinjorino. (Eliras dekstren.)

## Sceno kvara

Matildo (sola)

Kompatinda! La kulpo, fine, estas de tiuj, kiuj ŝin edukis. Ĉe ili estas la teruro, per kiu oni penas korekti la infanon.—Anstataŭ montri al ĝi la malbonon, oni minacas per fantaziaĵoj, kaj plenigante malhele la infanan spiriton per strangaĵoj, antaŭe oni preparas ĝin por ĉiuj malveraj ideoj, faras el ĝi timemulojn, kaj la eraro; kaj antaŭjuĝoj, kiuj falas en la nescion spiritan de la mensogo, multobliĝas je superstiĉoj. Pensante nur pri mi, la kompatinda knabino daŭrigus sian oficon—ŝia superstiĉo ne min timigas—mi estas tre bone kirasita kontraŭ ĝi: bedaŭrinde, la spirito de Eleonoro ankoraŭ ne estas tute formita, kaj ĉio, kio falas en ĝin, povas fariĝi floro aŭ dorno. Hodiaŭ estas la nigra papilio, morgaŭ la akrido verda, poste la grilo, poste la musido... Ne! Ni evitu ĝustatempe pli grandan malbonon.

## Sceno kvina

Matildo kaj Eleonoro

Eleonoro

(eniras kurante, profunde senkuraĝa, kaj lasas sin fali sur seĝon, etendante bluan paperon al Matildo.)

Voĉo (obtuza)

Legu, panjo. Mi ne kuraĝas.

Matildo

Kio estas tio?

Eleonoro

Telegramo.

Matildo

Ĉu vi ricevis ĝin nun?

Eleonoro

Ĝuste nun.

Matildo

De kie ĝi venas?

Eleonoro

De Laranĝeiras...<sup>[10]</sup> (Tragedie.) La papilio...

Matildo

Ĉu la papilio alportis ĝin?

Eleonoro

Nedube...!

Matildo

Ĉu la papilioj estas nun dungitaj en la telegrafejo? Mi ne sciis.

Eleonoro

Ne ŝercu, panjo. Mi estis certa pri tio.

Matildo

Pri la telegramo?

Eleonoro

Aŭ pri alia afero... pri ia malfeliĉo. Mario estis preĝanta, panjo vokigis ŝin... Jen vi havas.

Matildo

Vere la malfeliĉo ne povus veturi pli rapide—por ne perdi tempon ĝi venis telegrafe. (Eleonoro ploras.) Sed ne malkvietiĝu, antaŭ ol vi legis la telegramon, kaj eĉ vi ne scias de kiu ĝi venas.

Eleonoro

Ĝi estas de Eŭgenio.

Matildo

Kiu Eŭgenio?

Eleonoro

Eŭgenio de Lima, tiu, kiu loĝas en Laranjeiras.

Matildo

Ia koleginio? (Jesa kapsigno de Eleonoro.) Kaj ŝi estis malsana?

Eleonoro

Mi ne scias... Certe ŝi mortis.

Matildo

Do, la telegramo ne venas de Laranjeiras, filino,—ĝi venas de la alia mondo.

Eleonoro

Ho! panjo...

Matildo

Ni vidu. Kvietiĝu. (Malfermas la telegramon kaj legas ridetante.) Vere la papilio...

Eleonoro (ektremege)

Ŝi mortis!

Matildo (legante kviete)

"Eleonoro. Atendas vin morgaŭ nepre, bapto Mimi. Eŭgenio."



Eleonoro (surprizite)

Ha!

Matildo

Ŝajnas, ke la novaĵo ne postulas funebbron?

Eleonoro

Pri la bapto de la pupo... Mi estas la baptopatrino. (Rekvietiĝinte.) Kia senpezigo!

Matildo

Vi vidas, ke vi estis nejusta pri la papilio.

Eleonoro

Ha! Sed kiu scias tion, kio povos ankoraŭ okazi.

Matildo

Jes. Povos ankoraŭ okazi multe da aferoj. Vi povos, ekzemple, opinii, ke la vesto, kiun la kudristino sendis, ne alĝustiĝas al via nova ĉapelo...

Eleonoro

Ĉu la vesto jam venis?

Matildo

De mallonge.

Eleonoro

Kaj panjo diris nenion.

Matildo

Vi estis priokupata pri la papilio kaj pri la ŝercaĵoj de Mario.

Eleonoro

Vi parolas tiamaniere, ĉar vi ne vidis la papilion.

Matildo

Mi jam diris al vi, ke ili kutimas dormi sur mia litkurteno; pro tio mi ne havas terursonĝojn, kaj mi ne envias la feliĉegon de la plej feliĉegaj, ĉar mi konsideras min perfekte feliĉa. Kaj vi ankaŭ estas tia: vi havas patron, kiu vin amegas; kaj mia koro... Kion plu vi volas? (Altirante ŝin al si.) Diru: ĉu vi kredas ankoraŭ je la influo fatala de la insektoj?

Eleonoro (timeme)

Mario...

Matildo

Mario estas kompatinda vilaĝano, mia filino; ŝi estis edukita de nekleruloj, kiuj plenigis al ŝi la kapon per absurdaĵoj. Via religio, kiu estas tute pureca, forigas kaj batalas ĉiajn superstiĉojn. Ĉu vi kredas, ĉu vi opinias eblaĵo, ke Dio fidu la sekretojn de sia kompatato aŭ la decidojn de sia kolero al la vagantaj papilioj aŭ al la akridoj? Ĉu vi kredas, ke Li sciigu siajn intencojn laŭ maniero malmulte pura aŭ mallerta, elverŝigante oliv-oleon aŭ dispecigante spegulojn, kaj ke Li donu al estaĵo simplanima eksterordinarajn povojn por nuligi siajn intencojn? Ĉu vi ne vidas, ke ĉio tio estas kontraŭ la komuna saĝo kaj kontraŭ la principoj de via kredo? Vi parolas pri nigra papilio, kaj vi ne havis ankoraŭ, dum viaj ferioj, tagon pli ĝojan ol la hodiaŭan. Estas motivo, por ke vi malfermu larĝe la fenestrojn de via ĉambro, lasante, ke ili eniru centoble, la antaŭdirantaj papilioj. (Karese.) Forkuru de la kredaĉoj, ne atentu pri malsaĝaj vortoj. Mario estas malspritulino—ŝi vivas en la mallumo de la nescio, en kiu oni lasis ŝin, kaj, el la mallumo, la malfeliĉa elprenas ĉiujn malĝojegajn fantaziojn, per kiuj ŝi venenigadis kaj miregigadis vian spiriton. Papilioj, ili estu iaj aĵoj, de tiu aŭ alia koloro, ĉiuj ili estas nedanĝeraj—ili vivas serĉante la lumon—la sunon aŭ la flamon de l' hejmoj. Ili ne alportas antaŭdirojn, ili alportas ĉarmojn, ili estas la evidentigo de la granda vivo, kiu plenigas la planedon loĝatan de ni. Tiaj estas la papilioj.

## Sceno sesa

La samaj kaj Mario

Mario (kun pakaĵo, singultante)

Jen mi, mastrino. (Al Eleonoro.) Atentu, fraŭlino; nur pro tio, ke mi multe amas vin, oni forsendas min.

Eleonoro

Kiu forsendis vin?

Mario

La mastrino. Ĉu vi ne scias? Mi rakontis la aferon pri la nigra papilio, kaj ŝi maldungis min. Ĉu mi ne diris al vi, ke okazos ia malfeliĉo? La papilio eraris: anstataŭ eniri en mian ĉambron, ĝi eniris en la vian; sed la antaŭdiro estis por mi. Plie, mia pugn-amuleto fendiĝis; mi lasis ĝin sub la suno. Ĉio nebona okazas al mi. Fine, la volo de Dio plenumiĝu.

Eleonoro

Ĉu panjo forsendas ŝin?

Matildo

Jes.

Eleonoro

Kial?

Matildo

Ŝia apudesto ne konvenas al vi. Ne nur la korpaj malsanoj estas komunikeblaj, tiuj de la spirito ankaŭ estas.

Eleonoro

Do, nur pro la superstiĉaĵoj?

Matildo

Vere tio estas bagatelo...

Eleonoro

Kvietiĝu. De nun mi ne lasos min impresi, kaj eĉ mi bonfaros al ŝi.

Matildo

Ĉu vi?

Eleonoro

Panjo diris al mi de ne longe, ke pro nescio ŝi agas malbone.

Matildo

Jes, vere.

Eleonoro

Do, la nescio estas afero facile korektebla. Kaj jen mi korektos ŝin: mi tuj ekinstruos ŝin la legadon.

Matildo

Vi povas diri: mi tuj lumigos ŝian animon.

Eleonoro

Permesu, ke ŝi restu, panjo. Mario estas bonega knabino.

Matildo

Se vi promesas plenumi, kion vi diris...

Eleonoro

Mi promesas. Ŝi alportis al mi la mallumon, mi kompanse liveros al ŝi la lumon.

Matildo

Tre bone. Nun al la sibilo. (Vokante.) Mario!

Mario (elviŝante la okulojn)

Jes, sinjorino!

Matildo

Eleonoro petas, ke mi restigu vin, kaj mi ne volas ĉagreni ŝin, por ke ŝi ne atribuu tion al la influo de la nigra papilio.

Mario

Tiu malŝatinda!

Matildo

Se la familianoj plaĉas al vi...

Mario (lasante fali la pakaĵon)

Se ili plaĉas!... Sed kie mi trovos la zorgojn, kiujn mi ricevas tie ĉi, la afablaĵojn, kiujn vi faras al mi?

Matildo

Nu! Vi povas resti kun ni la tutan tempon, kiun vi volos, se vi lernos kredi, ke la papilioj flugas pace kaj la akridoj, kaj se vi ne faros sorĉaĵojn ĝusta-tempajn aŭ ne-ĝustatempajn.

Mario

Mi promesas, mastrino. Mi mem vivas tre enuigita de tiuj aferoj. Ĉio okazas inverse. Ĉu vi volas scii? Mian tutan salajron de la pasinta monato mi perdis pro aĉeto de biletoj de loterio, kaŭze de akrideto. Mi renkontis unu ĉe mia kapkuseno, kaj pro tio, ke mia patrino ĉiam diradis: "Akrideto ĉe kapkuseno, mono, multe da mono", mi aĉetis biletojn abundege.

Eleonoro

Kaj poste?

Mario

Ĉiuj nepremiitaj. La papilio aliras al la ĉambro de la fraŭlino, kaj la domo falas sur min.

Matildo

Tio taŭgas, por ke vi konvinkiĝu. Krom tio, ke vi restas en mia domo, Eleonoro proponas instrui vin pri la legado.

Mario (ĝoj-radie)

Ĉu vi, fraŭlino?

Eleonoro

Jes.

Mario

Ha! La blanka papilio, kiu venis antaŭhieraŭ.

Matildo (severe)

Kion vi diras?

Mario

Neniam plu, mastrino... (Tre mallaŭte.) La blanka papilio... (Kun la manoj en teniĝo de preĝo.) Legi! Kian volon legi mi havas, vivi kun la okuloj en la libroj! Estas dirate, ke kiam oni legas, estas kvazaŭ oni havas flugilojn—oni iras kien oni volas, ni vidas kion ni deziras... Kaj mi tre volas vidi, sed mi estas kvazaŭ blindulino... Ha, fraŭlino! Ne, la papilio ne estis nigra... ne povis esti... Ha, fraŭlino!... Mi vivas antaŭ palaco el oro kaj eburo... La pordoj estas fermitaj, interne estas riĉaĵoj... Kiaj riĉaĵoj!... Kaj jen la fraŭlino, kiu diras al mi: "Mario, prenu la ŝlosilojn de l' palaco, malfermu la pordojn kaj eniru". Legi!

Matildo

Nu! Ĉu vi volas?

Mario

Ĉu mi volas?! Ho, mastrino!...

Matildo

Kaj vi promesas neniam plu diri sensencaĵojn similajn al tiuj, kiujn vi diradis al Eleonoro?

Mario

Mi diradis, ĉar mi kredis, sed nun mi estas konvikita, ke ĉio tio estas fabelo. Papilioj, akridoj, noktuoĵ... (Post silento.) Legi! (Subite.) Sed, fraŭlino, ĉu vi bone vidis...?

Eleonoro

Kion!

Mario

La... Ne... Mi ĵuras, mastrino, ke neniam plu mi parolos pri papilioj. (Tre mallaŭte.) Legi... Lerni la legadon... Ne, ne estas eble, ke la papilio estis nigra... Ĝi estis blua, certe, de la koloro de l' ĉielo...

Matildo

Nu, Mario?

Mario (ekstaze)

De la koloro de l' ĉielo...

Eleonoro (ridante)

Kio, knabino...?

Mario

La... la... mia alfabetumo, fraŭlino... De la koloro de l' ĉielo, kaj la literoj brilantaj kiel steloj... (Ploras kortuŝite.)

Matildo

Kompatinda knabino! Vere, estus kruelaĵo revenigi ŝin al la mallumo.

(Kurteno.)

## **Trioletto**

La unuan fojon mi vidis vin, Ne la plej feliĉa mi sentis min. Donjo, arde mi vin  
adoris tuj La unuan fojon mi vidis vin; Sed adoro tia, en via kor' Veran amon al  
mi elvekis, flor'. La unuan fojon mi vidis vin, Ne la plej feliĉa mi sentis min.

## Alvoko

El "Rakontoj pri Amo", de João Baena

Sunradio falis sur la sep glavojn, kiuj disŝiras la bruston de la Sankta Virgulino Dolorata, kaj du gekolomboj flirtetis super la kornicoj de l' templo, inter la densaj nuboj de bonodor-fumo, kiuj suprenleviĝis el la bonodor-fumiloj, maldikiĝante tra la altaroj kaj ogivoj. Genufleksinta, tre ĉasta kaj malĝoja, tenante blankegajn manojn kunmetitajn en sintenado de petego, kaj la beletajn okulojn turnitajn al la ĉielo, tiu, kiun mi amas kaj pri kiu mi sopiras, preĝis kun tiom da fervoro kaj piemeco, ke estus malfacile scii, ĉu ŝi petegis kompaton pri siaj grandaj kulpoj, ĉu ŝi preĝis ardege por la feliĉeco de sia amo.

—Sankta Virgulino Dolorata, protektu tiun, kiun mi amas, kaj pri kiu mi vane sopiras.

---

Mi amis ŝin en tiu mallonga intertempo per ĉiuj fortoj de mia animo, per tuta sincereco kaj ekmovo de unua kor-inklino.

Kaj kiam la Diservo finiĝis, mi ekvidis, ke mia feliĉego ankaŭ finiĝis, restante al mi nur la dolĉa-maldolĉa rememoro de tiuj forflugantaj momentoj dum kiuj mi ekvidis la paradizon, ne povante atingi ĝin.

—Sankta Virgulino Dolorata, protektu mian amon.

---

Tiu, kiun mi amas, kaj pri kiu mi sopiras, de longe forlasis min; sed kiam ŝi forlasis min, ŝiaj belegaj okuloj renkontis la miajn, kaj neniam plu mi povas forgesi ilin, neniam plu.

Ili estis, tiuj okuloj, tiel klaraj tiel puraj, tiel kvietaj, ke oni dirus ilin faritaj el porcelano, kiel tiuj de la pupoj riĉaj. Okuloj, tiaj, kiaj, ne havante la reveman esprimon de la suferantoj, penetras en la profundon de l' koroj por ĵeti en ilin la ĝermon de la pasio, kiu malsaĝigas kaj mortigas. Okuloj tiaj, kiaj delogas nin kaj suprenlevas nin al la ĉielo; kiuj forpuŝas nin kaj instigas nin al krimo.



—Sankta Virgulino Dolorata, protektu la marverdajn okulojn de la virino, kiun mi adoras kaj amas.

---

Ŝi forlasis min, sed ĉu brilas en la Supro la konsoliga lumo de la stelaroj, ĉu tereniĝas ĝermigante la teron, la brulantaj radioj de l' suno, mi vidas ilin ĉiam fiksataj sur min, persistaj kaj kruelaj, revivigantaj al mi la doloron perdi ilin, kaj la sopiron, kiu kortuŝas min kaj doloras min, kiel malfeliĉulon. Sed mi deziregas vidi ilin, efektive, denove, surverŝantaj sur mian animon turmentitan la brilegon, kiu iluminas ilin kaj poste ... poste morti.

Kaj kiam, ĉe la lasta momento, la animo forkuros el la tera elvolvaĵo, ili venu kompatemaj kaj malavaraj, doni al mi la lastan oleumon de sia kiso farita el lumo.

—Sankta Virgulino Dolorata, protektu mian amon. Donacu al mi la favoron havi en la lasta momento, kiel du vakskandelegojn, tiujn adoratajn okulojn, kiuj forkuris de mi kaj sin impresas ĉiam sur mian retinon, persistaj kaj kruelaj, ĉu brilas en la Supro la konsoliga lumo de la stelaroj, ĉu tereniĝas, ĝermigante la teron, la varmegaj radioj de l' suno.

—Sankta Virgulino Dolorata, estu malsevera, estu kompatema.

## Sola

(Al Donjo)

Sur placo bruega amaso da homojĜojas kaj ridasKontente.En kaĝo firmita la birdoj pepetas,Turnas, returnasPetole.

Odoraj kaj belaj ekfloras la arboj:Rampas la vermojAgemaj.De fortepiano agorda per tremoVibras aeroLa pura.

De ĉio, de ĉie, de l' tero ĉielenBruas la vivoRidanta.Silenta, malĝoja, en mez' de feliĉoMortas sopireMi, sola!

## Kiel knabo povas sin mem rekomendi

El "The royal star readers"

(Al la brazilaj knaboj)

1. Negocisto anoncis, ke li bezonas iun, kiu lin helpu en lia oficejo, kaj proksimume kvindek knaboj sin prezentis petante la oficon. Tuj li elektis unu el ili, kaj forpermesis la aliajn.
2. "Mi dezirus scii", diris unu el liaj amikoj, "kiaj estas viaj motivoj por akcepti tiun knabon. Li ne montris al vi simplan leteron de rekomendo."
3. "Vi tute eraras", diris la negocisto. "Li viŝis siajn piedojn, kiam li eniris, kaj enirinte, li fermis la pordon; tio montras, ke li estas orda kaj pura."
4. "Li tuj cedis sian seĝon al la maljunulo, kiu eniris kun unu el la knaboj: tiamaniere pruvante, ke li estas tiel bona kiel pripensa."
5. "Li demetis sian ĉapelon, kiam li eniris, kaj li respondis miajn demandojn rapide kaj konvene; tio pravas, ke li estas ĝentila."
6. "Li prenis per la mano la libron, kiun mi surlasis sur la planko, antaŭ la alveno de l' knaboj, kaj li ĝin metis sur la tablon, dum ĉiuj aliaj paŝis super ĝi aŭ puŝis ĝin aparte; tio ĉi montras, ke li estas zorgema."
7. "Li atendis pacience sian vicon anstataŭ repuŝi unu el la aliaj; tiel mi sciis, sen pli da demandoj, ke li estas modesta."
8. "Kiam mi parolis kun li, mi rimarkis, ke liaj vestoj estas bone brositaj, liaj haroj en agrabla maniero, kaj liaj dentoj blankaj kaj puraj."
9. "Kiam li skribis sian nomon, mi vidis, ke liaj ungoj estas agrable zorgitaj kaj neprovizitaj per pintoj kiel tiuj de kelkaj el la aliaj knaboj."
10. "Ĉu vi ne nomas tiujn faktojn la plej bona speco de leteroj? Mi juĝas, ke jes; kaj kion mi povas diri pri knabo, uzante miajn proprajn okulojn dum dek minutoj, tio estas pli valora ol ĉiuj belaj leteroj, kiujn li povas alporti al mi."

## **Rozoj, rozoj...**

Iam matene mi vidis Belan rozujon florantan; Gaja, soleca rozeto De ĝi alloge pendetis.

Blanka, pli blanka ol neĝo, Pura, pli pura ol brilo; Ĝin tre deziris elŝiri Mi el ĝardena branĉeto.

Sed ĝardenisto kruela  
En ĝin solvaĵon injektis,  
Dolĉan, misteran. De tiam,  
Ruĝa, la rozo fariĝis.

Kiel alloge sin turnis  
Al mi belega la floro!  
Arde mi volis ĝin tuŝi,  
Krude per dornoj min vundis.

Pasis la tempo. Alvenis  
Nova aŭroro printempa.  
Ree ekfloris rozujoj:  
Ne plu refloris la mia.

Tamen ne mortis la rozo.  
Ŝanĝis nur ĝia koloro:  
Flavaj sulkigis, ekfalas  
Ĝiaj petaloj velkintaj.

Tiam la branĉo sin ĵetis  
Sur min karese; kaj rozo  
Dolĉe, dolĉege, tuj kuŝis  
Sur ŝultro mia por kiso.

For! Tuj, rozujo kruela!  
Blankan, mi amis respekti;  
Ruĝan, deziris ardege;  
Flavan... Rozujo malbela!

Kial ne lasis vi, ke mi  
Ĝoje enspiru la virgan,  
Ĉarman odoron de l' blanka?  
Aŭ mi eksentu volupte  
Kun pasiego kaj fajro  
Brilan veluron de l' ruĝa?

Rozoj tre blankaj, tre puraj.  
Rozoj, tre ruĝaj, tre ardaj,  
Venu karese, multope!  
Sed vi, rozaĉoj malbelaj  
Jam senodoro, velkintaj.  
Ho! Kunfandiĝu en polvo,  
Naŭza paŝtaĵo de l' vermoj.

## La horloĝo

—Kioma horo? Ŝajne malrapidas  
Horloĝo mia. Ĝusta kun la via, tre  
ĝusta, Deziras ĝin mi.

—Ne estu infano! Ne helpas,  
Ke horloĝoj kune iradu.  
Pli malpli rapide, aŭ ĝuste,  
Ne revenas tempo estinta.

Preferinde ni ĝustigu la animojn.  
Alproksimigu vian bruston al mia,  
Metu la lipojn sur la miajn, ho, Donjo,  
Korojn amantajn tre intimaj ni sentu.

## Lulkanto

(Al Donjo)

Dormu, mia infano! Havas koro amanta  
Pli da vido akrega, Ol la aglo fluganta.

Ĉio dormas sur tero; Rozoj, vermoj, brutaro!  
Dormas sablo arĝenta Sub la kisoj de l' maro!

Dormu, mia infano! Sur la volbo ĉiela  
Brilas puraj la steloj, Kaj mi gardas fidela.  
En la nesto birdetoj Krias, tremas timemaj;  
Sed kviete redormas Sub flugiloj amemaj.

Dormu, mia infano! Dormu! Ne timu doloron  
Gardas mi vin pli zorge Ol avarulo trezoron.

## Se mi estus riĉa...

(Rakonto laŭmemore verkita)

Antaŭ multaj jaroj vivis en malgranda urbo ŝuisto tre malriĉa, kiu ne povis kompreni, kial ĉiuj homoj ne havas egalan sumon da mono. Ĉiutage, de la mateno ĝis la nokto, li diradis:

—Mi laboradas senĉese, mi estas ŝparema, mi ne monludas, tamen neniam mi havas monon, miaj poŝoj estas ĉiam kiel korbo truita. Ha! Se mi estus riĉa!...

Kaj li vidadis preterpasi la lukse vestitajn personojn. Li aŭdadis frazojn orajn: miaj juveloj, miaj kapitaloj, mia servistaro ktp. Li ĉagreniĝis, tial, ke li ne povis paroli sammaniere, kaj tre malfeliĉe li vivis.

Ian tagon, sidante sur lia ligna benketo, senarte farita, li ekkriis:

—Se la diablo mem volus doni al mi monon!...

Tuj eklumis fulmo, kaj aperis sinjoro ruĝe vestita, kiu diris al li:

—Bonan tagon, mia bona. Pri kio vi pensas tiel serioze! Kio estas al vi?

—Pro kio tio interesas vin? Se almenaŭ vi donus al mi monon, multe, multege da mono...

—Kial ne? Se vi preferas monon, ĝin vi havos. Mi donos ĝin al vi ĉiutage.

—Vi ŝercas.

—Tute ne. Sed estas tri nepravaj kondiĉoj: unue, vi diros al neniuj el vi unu vorton pri nia afero; due, vi elspezos la tutan monon antaŭ ol la suno subiros...

—Ĉu vi parolas senŝerce?

—Atendu momenton. Trie, se vi ne plenumos tiun ĉi interkonsenton, via animo apartenos al mi.

—Konsentite, diris la ŝuisto, post momenta pripensado.

—Bone. Jen estas papero kaj plumo Subskribu la kontrakton per via sango. Perfekte. Nun, eniru en vian domon, kaj ne forgesu unu vorton el ĉio, kion mi diris.

Nova ekfulmo, kaj la ruĝe vestita sinjoro malaperis subite.

—Sendube mi revis. Tio ne estas ebla. Mono, multe, multege da mono por mi? Ne, neeble!

Sed sur lia dika fingro briletis, kiel malgrandeta rubeno, guto de sango. Tiam li leviĝis ŝanceliĝante, kaj malrapide direktis sin al sia budo.

Sur la senarta ligna tablo kuŝis saketo velura. Li palpis, kaj sentis ion malmolan, rondan. Tremante de teruro kaj pro espero, li malfermis la saketon. Brilantaj moneroj el oro frapis liajn okulojn mirigitajn. Kun la palpebroj senmovaj, larĝe malfermitaj, per tremantaj manoj, li elŝutis la enhavon de la saketo, kaj la moneroj diskuris disĵetante flavajn fajrerojn.

Oro! Oro! Oro! Ĝi estas mia! Riĉa! Mi estas riĉa, riĉega! Bone! Ni kvietiĝu! Kion mi faros el tiu mono? Unue, mi bezonas vesti min pli bone, loĝi en domo konvena, lui... lui, ne: aĉeti kaleŝon. Due, manĝi bombonojn. Mi ne scias, ĉu ili estas bongustaj, aŭ ne. Vere, neniam mi sukcesis manĝi bombonojn. Mi tuj iros... Ne, mi devas tien sendi mian serviston. Sed, kie li estas? Ha! Tiu malriĉulino, kiu loĝas proksime de mi, havas knabeton dekjaran. Mi dungos lin, kaj mi pagos po 1 Sm. ĉiusemajne. Ja, tio estas malŝparemo.

Kaj li komencis plenumi sian kontrakton. Li aĉetis ĉion, kion li renkontis. Je la kvara horo posttagmeze restis ankoraŭ unu spesmilo.

—Almazon! Mi malsatas.

—Morgaŭ. Mi havas nur unu spesmilon, kaj mi bezonas fumi cigaron.

La sekvantan matenon, kiam li ellitiĝis, jam sur la tablo de lia princa palaco kuŝis la infera donaco. Li matenmanĝis, kaj jungigis la ĉevalojn al sia kaleŝo, kaj rekomencis elspezi la monon. En la fino de la tago estis ankoraŭ multe da ĝi en lia monujo. Al lia cerbo ne venis la plej simpla ideo pri la nepra elspezo de la mono. Tiam li ekpromenis kun la monujo enhavanta la restantan monon. Meze de granda publika ĝardeno, kiel

hazarde, li faligis la monujon, kaj revenis hejmen tre ĝoje. Tuj kiam li eniris, iu vokis lin.

—Sinjoro markizo, diris al li junulo, mi trovis tiun ĉi monujon, kiu apartenas al vi.

—Ja, vi estas honesta homo. Mi estas kontenta je vi. Konservu ĝin kiel memoraĵon de via bona ago.

—Pardonu min, sinjoro, ne pro via mono mi alportis la monujon. Mi ne akceptas.

---

Ian tagon la poliestro arestigis lin por klarigoj: oni murmuretis, ke li faras nelegajn monerojn. Li prezentis specimenojn. La spertuloj rekonis ilin legaj. Tamen li perdis multe da tempo antaŭ ol la afero estis decidita. Tuj post la liberigo li trinkis iom da brando por klarigi la ideojn. Li ne sukcesis. Tiam li drinkis. Li ebriiĝis, kaj dormis ĝis la sekvanta tago.

Kiam li vekigis, bela kaj ridetanta sinjoro, frake vestita, salutis lin, kaj tre afable diris:

—Mi havas ion por diri al vi, sinjoro.

Scivolonte li esploris la luksan ĉambregon, kaj terurigite li vidis, ke ĉie estis oro, oro, multe da oro; sur la tablo, sur la lito, sur la pargeto, sur la speguloj, ktp.

—Tra kie vi eniris? Kion vi deziras? Ĉu monon? Al ĉiuj diabloj la mono!

—Ne pri mono, sinjoro, sed pri alia afero. Ĉu vi bonvolos doni al mi aŭdiencon?

Post malĝentila oscendo, li diris:

—Bone! Sidiĝu senĝene. Mi aŭdas vin.

La sinjoro frake vestita ne akceptis la inviton. Li nur frapis sur la plankon, kaj tuj sulfura fumo ekaperis, kaj la ruĝe vestita donacinto de la mono sin prezentis al la kompatinda ŝuisto.

—Kio fariĝis la oro, kiun mi donis al vi?

—Ho ve! Mi drinkis, kaj mi dormis multe pli ol mi esperis. Mi ne povis ankoraŭ elspezi la tutan monon, kiun mi ricevis hodiaŭ.

—Ne, sinjoro, vi eraras. Jam de tri tagoj vi ne elspezas la tutan monon, laŭ nia kontrakto.

—Aŭskultu min, bona amiko. Mi aĉetis la plej multekostajn objektojn, mi estas tre riĉega. Por diri al vi la veron, mi ne scias, kion plu aĉeti. Mi ne volas vian oron: al mi ĝi ne donas la feliĉon, kiun mi esperis. Forportu ĝin, kaj lasu min trankvila.

—Ne, tute ne. Vi ne aplikadis la oron, kiun mi donis al vi, en konvena maniero. Vi forgesis, eĉ vi evitis, elspezon nefineblan, por kiu ne estas sufiĉe da mono en la tuta mondo. Vi forgesis, vi evitis la malriĉulojn. Neniam vi donis almozon. Neniam vi konstruis. Neniam vi edukis. Neniam vi laboris. Oro estas mia plej bona perilo. Se mi lasus vin kaj ne kunportus ĝin, mi perdus du gravajn posedaĵojn: mian karan armilon kaj vin, malbonulon.

Fulmo timiga sekvis tiujn vortojn. La palacego fariĝis denove budo, kaj en ĝia sola ĉambreto, sur la planko el tero, restis nur la korpo senanima de la ŝuisto karbiĝinta.

## Marmeze

(Al Donjo)

Ĉielo kaj maro! De tero nek ombro! Ondegoj petolaj sinsekve la ŝipon  
Ameme postvenas, proksimen alvenas, Envolvas karese, momente haltiĝas,  
Kaj tuj malaperas en sonĝo rapida. Sur ĉiu ondeto Vizaĝon la vian  
Mi vidas kontente Samtempe malĝoje.

Ĉielo la blua sin volbas sur maro, Laŭŝajne grandega ombrelo, Kaj suno  
brilanta trapasas, venkeca, Heligas la maron, vivigas la mondon. Kaj ĉio, la  
ondoj, ĉielo, la suno, Prezentas verege imagon karegan, La vian. Sopro!  
Malĝoja vorteto, kaj tamen Amema!

## Vero vera

(Al Donjo)

—Vin mi amas, kiel najtingalo Amas la tagiĝon!—Kaj mi ankaŭ... amas  
diademojn, Riĉajn kaj brilantajn.

Pro ci, mia stelo, mi suferos Dornojn, martirigojn!—Kaj mi ankaŭ... pikojn de  
orpingloj Suferados ĝoje.

—Kiel granda ŝildo, mia koroŜirmos vin, feliĉa!—Kaj mi ankaŭ... ŝirmos ĉion  
mianKontraŭ ŝteloj, raboj.

—Ciaj kisoj, cia bela buŝo,Ĉiam min vivigos!—Kaj min ankaŭ oro kaj  
monerojCerte tre ĝojigos.

—Ve! Se cia amo al mi ĉesos,Certe tuj mi mortos!—Kaj mi ankaŭ... ja mi  
baldaŭ dronos,Ne havante monon.

—Koro bronza! Dum mi ĝoje vivas,Nur pri vi pensante,Revas pri la mono  
malŝatindaVi, suferigema.

—Ne koleru! Mi sincereAmas vin pasie;Sed... ne, ne postulu de virinoPli ol ŝi  
don-povas.

## Neĝa statuo

(Al Donjo)

Revante mi konstruis statuonSen similo en la tuta mondo,Blanka kiel  
ciruso,Brila kiel stelo.

Mi al ĝi belaĵojn ĉiujn donis.Tiel bela estis ĝi, ke ravisVere min, la kreinton,Ĝiaj  
formoj belaj.

Pasie mi ĵetis min rapidePor ĝin preni arde kaj soife,Por tuj ĝin ekanimiPer  
avidaj lipoj.

Ho ve! La marmoro estis sonĝo;Nur revaĵo la malglata formo,El neĝaĵo  
faritaDe ludemaj buboj.

## Inter nuboj

Kia memorinda tago, tiu de la ekskurso al Pão de Assucar (Sukerpano), la genuo de la  
Ŝtona Giganto, dum la neforgesebla 5a Brazila Kongreso de Esperanto! Ĉiuj, kiuj ĝin  
ĉeestis, sentas ankoraŭ hodiaŭ,—jam pasis tri monatoj!—la plezuron tiam ĝuitan,  
aldonitan de la plezuro rememori agrablan temon. Meze de la vivo ĉiutaga, proza,  
batalanta estis sendube vera ripozo spirita tia ekskurso, kie regis la konfido, la  
amikeco, la senpriokupeco, ĉiu sin vidante inter preskaŭ nekonatuloj, sed sin  
prezentante, sin konatigante per la verda stelo, forgesante malamon, malĝojon,  
kontraŭaĵojn. Ĉiuj sentis, ke ja ekzistas tio, kion oni nomas E s p e r a n t u j o , por  
esprimi lokon por paco kaj amo frata.



Tiel profundan impreson mi ricevis, ke ankoraŭ hodiaŭ spirite mi revidas klarege la scenojn kaj la scenejon de unu el niaj plej belaj numeroj de la programoj de niaj modestaj kongresoj. Kaj sub tia plezuriga impresio plaĉas al mi rememorigi tian ekskurson, rakontante al miaj legantoj (eble la multenombro estas vanta trograndigo) kelkajn faktojn ne publikigitajn. Kiam la kongresanaro alvenis al la stacidomo de Praia Vermelha (Ruĝa Marbordo), la vetero estis belega: la ĉielo blua, sennuba, la aero freŝa, la tuta naturo ridetis ĝoje: certe pro la kunhelpo de la graciaj samideaninoj. Ni restis en ĝoja atendo dum preskaŭ unu horo ĝis la ek-supreniro. Kiam ekveturis la unua grupo, mi rimarkis, ke unu el niaj plej belaj samideaninoj trovas ĉiam motivon por daŭre esti en sama loko. Mi observis la fakton, sed mi ne povis ĝin al mi klarigi. Post iom da tempo mi ne povis min deteni, kaj mi demandis:

—Fraŭlino, kial vi ne supreniras?

—Mi tre timas, mi ne iros ĝis la supro. Mi restos tie ĉi. Mi timas. Kion? Mi mem ne scias, sed mi timas.

S-ro Fridolino Cardoso, la afabla administranto de la aera fervojo, kiu staris proksime, sin intermetis:

—Ĉu vi timas ian danĝeron pro la konstruado de la fervojo? Mi certigas al vi, ke tute ne estas ia danĝero. Ne timu! Aŭskultu min pacience!

Kaj la ĉarma fraŭlino aŭskultis pacience. Sed mi rimarkis ankaŭ, ke por pli bone tion fari, ŝi turnis sin al la punkto fina de la tramvojo, tiamaniere, ke ŝi povu vidi la venantajn personojn. Sendube simpla koincido.

—Mi tuj montros al vi la pravon de miaj vortoj, daŭrigis S-ro Fridolino. Vere, inter la deira stacidomo kaj la monteto *Urca* estas longo je 600 metroj, kaj inter *Urca* kaj *Pão de Açúcar*, 800 metroj. Sed... vidu mem! La reloj estas faritaj el du metalfadenoj paralelaj, fiksitaj ĉe la supra parto, kaj libera ĉe la malsupra.

—Do, la veturilo falos!...

—Tute ne! Pacienciĝu! Pezaĵoj el metalo, je 30 tonoj metraj por la unua segmento, kaj je 33 por la dua, faras la streĉon neŝanĝebla. Ĉiu veturilo estas sufiĉe ampleksa por 20 vojaĝantoj, sed por ilia komforto vojaĝas nur 16. La veturilo pendas de reloj je 44 milimetroj de diametro, faritaj el ŝtalfadenoj, kaj posedas rezisto-kapablon de 150 tunoj kontraŭ rompiĝo. La veturiloj estas tiritaj de ŝtala ŝnurego kies rezisto-kapablo estas 26 000 kilogramoj. Sed maksimume oni bezonas nur 3000. Do, la nedanĝereco estas klarega. La tuta vojaĝo daŭras 8 minutojn kaj duonon...

—Do, tute ne estas danĝera la vojo? interrompis la floro mirinda.

—Tute ne! Fidu tutanime!

—Bone! Ni iru!

Sed kiam la fraŭlino diris tiajn vortojn, ŝi sin jam estis turninta al persono, ĵus alveninta, kiu tiel longe atendigis la gracion samideaninon.

Tiam mi komprenis kiel la klarigo de S-ro Fridolino tiel bone efikis.

Mi decidis akompani la printempan paron, kaj ĝui la vojaĝon, ĉirkaŭita de atmosfero juna kaj ama. Sed kiam mi volis eniri en la vagoneton, S-ro Fridolino tre ĝentile malhelpis min, dirante:

—Jam enestas 16 personoj...

—Bone! rezignacie mi murmuretis. Ni lasu la 16 personojn, kaj ni atendu nian vicon. Dume ni interparolu pri la 16 reguloj de la fundamenta gramatiko, kaj ni ludu la rolon de la kvar personoj ankoraŭ akcepteblaj.

Kaj mi ekmontris la gramatikon al S-ro Fridolino, kiu de tempo al tempo diradis al mi: "Pardonu!" por doni ordonojn por la bona funkciado de la vojaĝoj. Tiamaniere, li povis lerni nur unu vorton en Esperanto, kaj nur unu formon gramatikan: "Pardonu!"

Fine mi lokigis min en la veturilo. Ni estis 20 personoj; sed la administranto klarigis al mi, ke infanoj ne estas personoj, kaj pro tio la kvar infaninoj kvinjaraj ne estas kalkuleblaj.

Kia belega panoramo! Kviete rulante sur la reloj, la pendanta veturilo transportis nin al la supro de U r c a . Super la ekstremo suda de la urbo, ni estis kvazaŭ en aeroplano. Dekstre, maldekstre, la panoramo estas impresiga. Ĉie maro, ĉie tero! Insuloj, marbordoj, lumturoj, fortikaĵoj; la silueto malproksima de la montaroj, kiuj plibeligas la belegan golfon G u a n a b a r a .

De U r c a ĝis P ã o d e A s s u c a r la veturilo rulas super la abismo. La panoramo fariĝas pli kaj pli impresiga.

Kiam mi alvenis al la belvidejo, vasta kaj poezia, mi aŭdis s-inon F.;

—Helpu nin! Helpu nin!

—Kio okazas? mi demandis terurigita.

—Ni estas arestitaj!

Mi staris maltrankviligita. Mi vidis nek katenojn, nek policianojn, nek modistinojn, nek florojn. Nur la muzikistaro ludis valson. Sendube la sinjorinoj estis fiksitaj sur la benko per la akordoj de la orkestro. Sed por tio oni petas helpon de kundancanto. Tiel mi invitis s-inon F. por danci.

—Ne, ne! Ni estas arestitaj de la vento.

Efektive, la vento blovadis forte, kaj ne permesis, ke la sinjorinoj stariĝas. Ok sinjorinoj, junaj kaj maljunaj, restis sidantaj silente sur benko, batalante kontraŭ sinjoro vento! Kia forto... tiu de la vento! Batali kontraŭ virino! Kion fari? Jen staris la demando, kiun, pro mia konatiĝo kun tia sinjoro, mi solvis. Mi proponis danci, denove. Fraŭlinoj kaj sinjorinoj rifuzis unuvoĉe. Se nur promenante, la vento... Mi pravigis ilin, kaj mi dancis tute sola. Mi ne scias, ĉu pro tio aŭ pro alia kaŭzo, la vero estas, ke la vento kvietiĝis iomete. Eĉ tiam la sinjorinoj ne kuraĝis forlasi sian rifuĝejon. Kun kia bedaŭro! Neniam oni dancis antaŭe sur la supro de Pão de Assucar! Ĉu la geesperantistoj ne faros tion, malgraŭ la vento? Por tia speco de batalantoj ne estas bariloj.

La aliaj gekongresanoj ĵus alvenas, kaj mi demandas:

—Kiu dancas? Kiu ne dancas?

Kaj mi formis du grupojn. El la nedancanta grupo mi faris muron vivantan, kaj mi uzis ĝin, kiel ventoŝirmilon. Jen solvita la problemo!

Ĉiuj ekdancis. Ankaŭ mi dancis kun tre gracia fraŭlino, unu el la plej distingindaj esperantistinoj, al kiu mi klarigis la diferencon inter venteto, vento kaj ventego.—La fraŭlino ekenuis. Tiam, mi komparis la ventegon de la naturo kun tiu de l' koro, esperante, ke la fraŭlino tuj komprenos min. Eraro! La fraŭlino tute ne konas la ventegojn de l' koro! Feliĉa knabino!

Kiam ni finis la duan valson, ĉe la horizonto aperis malgranda nubo.

—Baldaŭ ni estos ĉirkaŭitaj de nuboj, fraŭlino.

—Do, ni dancos inter nuboj?

—Jes. Sed mi opinias, ke ne estos tre agrable.

—Kial ne?

Mi klarigis al mia kunulino tion, kio estas nuboj, kaj tiufoje mia klarigo estis interesiga. Ne dubu pri la klereco de nia samideanino.

Kaj ni restis inter nuboj, mi ne scias kiom da tempo. Mi lasas al via sagaco, mia dubema leganto, diveni, de kia koloro estis la nuboj: ĉu blankaj, ĉu nigraj, ĉu rozkoloraj.

Kiam mi malsupreniris, mi estis malĝoja. Mi estis pensanta pri la revoj, nuboj kiujn ni starigas sur la ĉielo de nia vivo, kiujn la suno de l' amo koloras, kiujn la vento de la malespero forpelas.

## Confiteor

(Luiz Guimarães Filho)

Al maro, al astroj, al ventoj, Al la plej hontema el floroj, Konfesis mi amon la mian Kaj mian kaŝitan turmenton.

La ne-diskretemaj homoj Ĝin aŭdis de miaj du lipoj; Mi diris al Di', al anĝeloj, Per mia la voĉo poeta.

"Mi amas! Mi amas! Mi amas!" Mi ĉie kaj laŭte ekkrias, Al tuta la mondo mi diras.

Sed mi apud ŝi ekmutiĝas, Ruĝiĝas, timetas, paliĝas, Mi volas, sed diri ne scias.

## Miraklo

En nokto malluma, sub vento terura, La veloj ŝiritaj, la mastoj rompitaĵoj, Sur maro perfida, de ondoj ludilo, Sen lumo, sen kredo, sen fido, Gracia galero, beleta ŝipego, Venkinta, fiero, kun ŝarĝo riĉega, Humila hodiaŭ, hieraŭ vante, Sen gvido, al morto alkuras freneze.

Al kiu por helpo, por savo petegi? Al kiu por amo? Al kiu sukcese Sin turni? Ĉu sorto severa ne volas Kompate, ke hejmen revenu ŝipanoj? Okuloj ne vidas; oreloj nur aŭdas La venton minacan, fortegan, mortigan. Sopirojn profundajn la koroj elpremas, Similaj al ŝtono de blanka tombejo.

Ventego blekegas senbride, kolere; Sur ponto kruela aperas timeme, Kun sekaj okuloj, la lipoj tremantaj, Virino palega, kun filo sur brako, Senscie kuraĝa ĉe l'

vido de l' maro:"Rapide pereu la ŝipo, pereuLa mondo, mortiĝu la suno, la steloj;Saviĝu infano senpeka la mia."

Pliiĝas la vento, la ondoj multiĝas.Rifaro avida atendas kaptaĵon.Proksime, ankoraŭ cent metroj, rompiĝosLa homoj, virino, infano, galero.Jam alproksimiĝas momento fatala,Jam tuŝas la ŝipo la rifojn manĝemajn,Pliiĝas la vento, la ondoj grandiĝas,Fantomo terura finigos turmenton.

Tre alten, altegen, la ondoj leviĝas,Portante ĉielen mizeran la ŝipon.Kriego funebra superas ventegon,Ventego kolera respondas terure."Patrino, vi diras, ke Dio ĉeestasSur kampo, sur astro, sur tero, sur maro.Lin nun al mi montru, neniam Lin vidis..."Ne finis la frazon infano senpeka.

---

Kun granda bruego, kun granda frakaso,Mirinda ĵonglaĵo de granda lerteco,Trans rifon saltegas fiera galero,En golfo trankvila kviete ankriĝas.

## **Ami estas mia penso**

Konstanta, senlaca, vigla,Kiel la suno brila, eterna;Hela, supera, mirinda,Kiel radio de blua stelo;Ami estas mia penso.

Ĉie la morto vidiĝas,Sur la tero kaj sub la ĉielo,Forta, terura, timinda.En la mezo de ĉi-teruraĵojAmi estas mia penso.

Vivi estas ĝoje, brile,Aŭ malĝoje, malhele, malriĉe;Ĝu' sin miksas kun doloro.Ne grave! Malgraŭ ĉio, antaŭen!Ami estas mia penso.

Pasas la jaroj. PrintempoRidema de longe forlasis min;Venas vintro glaciiga,Sed ne soligas min la espero.Ami estas mia penso.

En la tombo, sub la plato,La vermo; diros entuziasme,Kun admiro tre sincera:Ni ne tuŝu lin, amikoj miaj!Ami estis lia penso!

## **Lina el Moskvo**

(El Dro Nuno de Andrade)

"Kiun aĝon, kiun religion, kiun nomon?" demandis la juĝisto, sulkigante per la mano haraĵa la denuncon, solan dokumenton postulitan por permesi la kondamnon al mortpuno.

"Tridekjara, hebreino, Lina Petrowski", respondis la juĝotino per voĉo unutona, preskaŭ ne movante la lipojn, en fordonita sintenado, kun la rigardo fiksita sur la katenoj.

Ŝi estis virino ankoraŭ bela, sur kies vizaĝon paligitan la malfeliĉo gravuregis fortike siajn signojn. Oni divenis pro la rando ruĝa de la palpebroj, la postsignon de la sendormeco kaj pro la kuntiriĝo de la buŝo senkolorigita, la historion de malnova doloro.

Ŝi mortigis dum unu sola nokto kvar soldatojn dormantajn; kaj kiam ŝi estis arestata, oni surprizis ŝin kisanita kun frenezulina fervoro la ponardon, uzitan por la buĉado.

—Ĉu vi konfesas la krimon, pri kiu oni akuzas vin?

—Certe, mi konfesas. Mi mortigis ilin: kvar soldatojn. Ili dormis. Mi iris malrapidege, piedon post piedo, sen la plej malgranda bruo, retenante la spiron, kaj mi ponardis ilin, ne donante tempon, por ke ili ĝemu, per tiu ponardo, kiu kuŝas tie sur la tablo. Dum ses jaroj mia kara kunulo restis senokupa, sed kiam de ĝi mi petis helpon,—ho!—ĝi vundis kvazaŭ tondro bonvena.

Kaj unusalte ŝi kurbiĝis sur la armilon, kisis ĝin, kaj revenis al sia loko kaj al la sama fordonita sintenado.

La juĝisto fikse ŝin rigardis.

La lipoj de la malfeliĉulino tremadis, kvazaŭ la malvarmo de la ŝtalo estis kaŭzinta en ŝi strangajn kuntiriĝojn voluptajn.

—Parolu, ordonis la juĝisto. Diru la kaŭzon, kiu vin instigis al la krimo.

—Ĉu paroli? Ne estas necese. Sufiĉas, ke vi elpremu mian koron, en kiu mi kunpremis, dum ses jaroj troe longaj, la nedireblan stimulon de la venĝo. Eltirigu mian koron el la brusto, premegu ĝin, kaj vi scios.

—La juĝisto ne volas frazojn. Parolu, mi ripetas.

—Nu! mi parolos. Ĝi okazis en Moskvo, en la jaro 1899. La grandduko Sergio komencis sian malnoblan regadon de turmentego, dissemante larmojn kaj malpuraĵojn... Ĉu vi scias tion? Eble ne. La moralo de la sklavoj ne ĉiam estas la moralo de la liberuloj. Via moŝto juĝista estas unu el ili: vi servas la tiranecon, kio volas diri, ke vi servas la inferon. Vi demetis la homan indecon profite je plenigo de la

stomako! Fine: mi kredas je la fatalaj dekreto; de l' sorto... Via moŝto juĝista estas difinita de la sorto, kaj eble mi vin timegigas.

—Mi malpermesas diri tiajn flankaĵojn. Se vi ne respondas, mi vin vipigos.

—Estis en Moskvo, en la jaro 1899. La grandduko, zorganto de la orfejoj, sin okupis precipe pri la senhonorigo de la edukatinoj. Unu el ili, suferantino de la malĉastulo imperia, rakontis al sia frato, leŭtenanto de la gvardioj, sian nemezureblan malfeliĉon. La junulo rapidegis al la palaco, ekcitis la granddukon al mortiga duelo; sed la malkuraĝulo rifuzis batali, kaj sendis al Siberio la venĝanton de la senhonoritino.

La rusaj princoj ne batalas: ili malgloriĝas.

En tiu sama epoko Sergio dekretis la elpelon de la hebreoj. Mia patro forkuris; kaj mi restadis, kune kun mia patrino paralizita. Ni estis enskribitaj en la malnobla registrolibro....

—En kia registrolibro?

—En tiu de la prostituinoj. Sed mi petas pardonon de vi. Mia patrino estis sanktulino, kaj mi estis virgulino...

La juĝisto stariĝis subite, kvazaŭ li vidis aperi, kuraĝega, antaŭ siaj okuloj, la fantomon de la malĝojego, kaj kun la haroj starigitaj kaj la buŝo malfermegita balbutis:

—Mi ne komprenas. Mi ĵuras je Dio, ke mi ne komprenas.

---

—Ho! Via moŝto juĝista havas koron... Kia surprizo! Mi klarigos. La dekreto ordonis, ke la hebreoj estu elpelitaj, sed ke la hebreinoj estu tolerataj, kondiĉe ke ili sin enskribigos en la prostituina registrolibro... Ĉu vi nun komprenas? Por ne forlasi mian patrinon!... mi enskribiĝis.

Preskaŭ neniam mi eliris el mia hejmo: La virinoj estis kaptataj sur la stratoj kaj alkondukataj al la plej proksima polica posteno... por kuracista ekzameno. Iun tagon mi iris al la apoteko pro kuracilo por mia patrino... Oni min arestis... Ho! Kia kruela afero! Oni alkondukis min al la posteno, kaj mi estis brute ekzamenita. Mia virgeco ŝajnis ribelo. Oni alkondukis min al la apudesto de la grandduko!... Li mem, la ponardisto, ankaŭ min ekzamenis. Mi estis sveninta. Kiam mi rekonsciis, mi aŭdis la

voĉon kapro-similan de la grandduko: "Oni alkonduku ŝin al la polica posteno, kaj oni ordonu al ĉiuj soldatoj, ke ili plenumu la ordonojn de la dekreto."

La juĝisto alproksimiĝis al la malfeliĉulino, kaj sensente li provis ŝiri la katenojn per siaj ungoj.

"Tremetante pro teruro, mi alvenis al la polica posteno. La ordono de Sergio, akceptita per aplaŭdadoj, estis plenumota... Ree mi svenis. Mi ne scias kiom da tempo daŭris mia turmento. Mi ne scias. Dio volis, ke mi ne mortu. Por kio? Por min venĝi! Kaj mi venĝis!

Rekonsciante, mi havis la korpon traboritan per doloroj kaj malpuraĵoj... Interne de mi malplenaĵo... mi estis sen animo. Starantaj, kraĉospruciĵoj per la ebrieco de volupto kaj de malĉasteco, kvar soldatoj...

—Mi estas nomata Ivan Koroff, mia bela...

—Mi estas Miĥaelo Turgueff, amatino mia...

—Stanislavo Kryé, mia koro...

—Petro Sturm, birdeto mia...

Frenezigita, kun la kruroj ŝanceliĝantaj kaj lacigitaj, trempegita je kolero kaj antipatiego, mi alflugis domen: mia patrino estis mortinta."

"Ĉu vi volas forkuri, filino mia?" demandis la juĝisto, grincigante la dentojn, kaj kun la pupiloj tre plilarĝigitaj, kiel tiuj de mortanto.

"Ne!" ekkriis Lina Petrowski: "mi volas morti. Mi vestigis mian patrinon per ŝiaj plej bonaj vestoj; mi faris ŝian enterigiron. Mi ŝin akompanis al la tombejo, kaj post kiam la tombisto finis sian laboron de eterna estingado, mi falis kun la brusto kaj la vizaĝo sur la teron malkompaktan de la tombo, mi gluis la buŝon sur la tero amika kaj mi paroladis persiste en la ĉerkon. Mi diris la ĵuron de la venĝo..."

"Ĉu vi volas forkuri, martirino?" ree demandis la juĝisto, algluante la lipojn febrajn sur la manojn glacie malvarmajn de la mortigintino.

—Ne, mi volas morti, nur. Mi kolektis la lastajn monerojn, mi aĉetis ponardon, kaj mi komencis mian dolorplenan vivon de ombro vaganta, ĉe la ĉirkaŭaĵoj de la grandduka palaco. Neniu atentadis pri mi. Mi makuladis la vizaĝon per koto, mi dormadis sub la



ĉielo, somere kiel vintre, timante malsaniĝi, timante morti, petante almozon de la malriĉuloj, evitante la soldatojn, forkurante de la lumo, por atendi Sergion.

Kvin jarojn, pli ol kvin jarojn, tiele, kun vulkano en la brusto kaj la ponardo apud la koro...

Unu tagon mi aŭdis ekbruegon, neniam antaŭe sentitan. Terurigite, mi eliris el mia kaŝejo, antaŭvidante, ke mia venĝo min forlasas... La bombo de Kalaieff punis la turmentanton de mia vivo...

Ĝi estis la venĝo de Kalaieff, kiu tiam efektiviĝis, sed ne la mia, ho! ne... De sia malproksima tombo mia patrino kriegadis. De sia nekonata ekzilejo mia patro sendadis manosignojn nekomprenoblajn... Sur la litaĉo de la polica arestejo mia virgeco sangomakulita singultadis... Mi havis la vidon fantoman de la fino de l' mondo. La pecetoj de la korpo de Sergio kotmakulas la asfaltan de la placo, kaj mia imagkapablo konvulsie skuetita ekvidadis, ĉe nigra fendo de la tero, la demonon subteriĝi kunportante en siaj brakoj kun karesoj ekstremaj, la animon de la grandduko... Subite, kiel sonoriloj por mortintoj, sonis en mia kranio kvar nomoj malbenitaj... Mi ne povus diri tion, kio okazis... Mi memoras malprecize, ke mi faradis demandojn... Oni arestis min. Mi pasigis ok monatojn suferante en karcero malluma kaj mucida; sed mi ne malsaniĝis, malgraŭ la remaĉado laciga de la fortegaj puŝoj al venĝo, transdonita, per la volo de la sorto, de la ordonanto al liaj banditoj... Fine oni senmuŝigis la arestejon, elpelante la mizerulojn.

La pafado de la kozakoj, tondranta en la stratoj, senpezigis la imperiestran kason je la ŝarĝo nutri la arestitojn. Mi eliris kun mia ponardo. Neniam ili esploris miajn poŝojn, mirakle!

Ĉe la pordo de la arestejo, soldato elparolis mian nomon... Mi returnen rigardis rapide, kaj mi rekonis unu el la kvar!

—Kiel vi estas nomata?

—Stanislavo Kryé. Venu kun mi. Mi dolĉe ĉagreniĝas pro via foresto. Miaj kamaradoj ankaŭ sopiras...

"Kaj... Ĉu vi iris?" demandis angore la juĝisto.

—Mi iris, al la sama polica arestejo. Ĉeestis la kvar.

Facile mi cedis al ĉio, kondiĉe ke ili min kaŝus dum la nokto, ĉar mi timas la pafadon... Ili promesis. Mi fermis la okulojn kaj mi sentis la ponardon tremeti, apud

mia karno, kun intensa ĝojego paradiza... Mia sento-kapablo vaporiĝinta ne plu lasis al mi la konscion de mia korpo... Mi ne scias, mi ne scias... Mi submetiĝis al ĉio, kaj kiam eknokiĝis, mi ŝajniĝis dormi. La kvar, tiuj dormegis. Tuj, ĉe la komenco de ilia dormo, mi provis stariĝi. Petro Sturm ronkis pli laŭte. Mi timis ilin veki, kaj mi refalis en mian ŝajnan dormon. Fine, ho! mi stariĝis, kaj mia kara ponardo sendis al la Sergia kunesto la kvar senditojn de la infero. Jen mia historio. Ĝi estas malĝoja, ĉu ne? Nun mi bezonas morti. Ĉu vi scias ia kialon? pro tio, ke, por plenigi mian mizeron, mi timas... ke mi estas patrino.

La juĝisto rigidigis sian korpon, etendis la muskolojn per larĝa movo kata, prenis la ponardon de Lina, ekkriis malespere kaj kuris delirante, tra la koridoro, eksteren...

—Mi volas mortigi la granddukon... mi volas rehonorigi la homan indecon... mi volas venĝi la malfeliĉegon de Rusujo...

Kaj li svingadis la ponardon, kun la frunto ŝvitanta, la haroj stariĝintaj, la buŝo plena de ŝaŭmo.

Li estis freneziĝinta.

## Destino

Kiu diris al la stelo la vojon, Kiu sur ĉielo blua ĝi sekvas? Kiel sian belan neston faradi? Tre facile frue birdo eklernis? Kiu diras al kreskaĵo: "Ekfloru!"? Por la muta vermo, kiu teksadas Ĝian silkan kaj blankegan mantelon? La fadenojn, kiu al ĝi estigas?

Eble iu al abelo instruis, Kiu nun zumadas sur flora kampo, Kie devas serĉi sian mielon, En la blanka floro, aŭ en la ruĝa? Ke vi estas mia vivo, anĝelo, Vivo mia viaj belaj okuloj, Amo via mia tuta feliĉo: Tion iu diris al mi neniam.

Kiel la abelo flugas al kampo, Kiel sur ĉielo kuras la stelo, Kiel al la homo ĝia destino En la penso sin konigas instinkte, Mi, fide, sur via brusto diina Volas vivi kaj plenumi destinon. Mi venas, tial, ke mi vivas pro vi, Por vi nur povas mi morti feliĉa.

(Traduko dediĉita al fraŭlinoj Maria Luiza Bocayuva kaj Esther Bloomfield)

## Piednotoj

[1] Fama portugala poeto, verkinto de "La Luziadoj". Elparolu: Kamonhez.

[2]Fama brazila verkisto. Elparolu: Alenkar.

[3]Tio signifas: vi estas tre klaĉema.

[4]Elparolu: Bom dia! (Bonan tagon!)

[5]ar—signifas portugale "aero". Ĝi estas ankaŭ la finaĵo de l' verboj de la unua konjugacio portugala.

[6]queimar—(elparolu: keĵmar, la akcento sur la lasta silabo) signifas: bruli.

[7]Fama portugala verkisto. Elparolu: Alešandre Erkulano.

[8]Korbisto, kiu faris korbon, povas fari centon. Tio signifas, ke tiu povas fari plu malhonestaĵojn, kiu kutimas fari ilin.

[9]Uyara—Spirito aŭ feino, kiu laŭ la popola kredo, loĝas ĉe la fundo de l' riveroj.

[10]Kvartalo de la urbo Rio de Janeiro.

#### **Notoj de transskribinto:**

Diversajn preserarojn de la originalo mi senrimarke ĝustigis.

\*\*\* END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK AMA STELARO \*\*\*

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE